

V 19034/1995
EL POPOLA 中國新聞

ĈINIO



3

1995

ISSN 0032-4361

- NIA BAKIN, NIA LINGVO
- VERDIGANTOJ DE FUNIU-MONTO
- JUNAJ ĈINAJ PIEDPILKISTOJ EN BRAZILO
- GEEDZOJ KAJ DOMLABOROJ



Floroj en vintro

Foto de LIU SIGONG

INTER NI

Feliĉa rekuniĝo

Oktobre de 1994, ni ricevis leteron de bulgara leganto Vasil Ostrev, en kiu li esprimis sian ĝojon rekuniĝi kun nia revuo kaj dankis nin pro nia reabonigo por li per Fondaĵo EPC-abono. Samtempe li sendis la artikolon "Malĝoja Disiĝo", kiun li skribis julie de 1992, kiam lia abono finiĝis.

Nia revuo iam aperigis en tiu ĉi rubriko du similajn leterojn de legantoj el Hungario kaj Rusio (estas aliaj tiaj leteroj ne aperigitaj).

Fakte, dankindaj estas niaj legantoj, helpemaj donacintoj por

Fondaĵo EPC-abono. Ni kore esperas, ke niaj legantoj daŭre helpos kaj subtenos nin diversmaniere, niaj abonantoj pli kaj pli multiĝos kaj Fondaĵo EPC-abono pli kaj pli kreskos.

Ĉi-sube ni citas fragmentojn el la artikolo "Malĝoja Disiĝo".

La Red.

Al vi, la bonega ĉina Esperanta revuo "El Popola Ĉinio", kara mia amiko, mi devas diri: Adiaŭ, adiaŭ, por ĉiam adiaŭ! Multajn jarojn regule mi ricevis kaj legis vin, vi subtenis mian vivon, mian vivforton kaj mian eblecon labori, legi, lerni, eĉ malmulte fizike labori. Sed mia abono finiĝis. Mi ne plu ricevos vin, ĉar mi ne havas monrimedojn denove aboni vin.


Por esprimi mian malĝojon kaj mian animan doloron, mi skribas tiun ĉi mallongan artikolon por diri al vi, ke mi neniam forgesos vin, ke vi estos al mi kara memoro... Vi estas la malfermita sorĉa pordego al la multmiljara kultura kaj historia vivo de la grandega ĉina popolo, kaj al la ĉarmaj naturaj belecoj de ĝia lando. Ĉiam kun ĝojo mi atendis kaj ricevis viajn bonegajn numerojn kaj legis ilin kun plezuro kaj ĝuo! Ĉiam mi estis kontenta pri ilia riĉa, varia kaj interesa enhavo, kontenta pri ilia bonega lingva stilo. Ĉarmaj estas iliaj ilustraĵoj! ...Mi deziras al vi longan vivon, por ĝojo de la bonega ĉina popolo kaj por viaj multnombraj legantoj en ĉiuj landoj en la mondo!

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Geedzoj kaj domlaboroj
- 6 En la dezerto Taklimakan
- 8 Gansu: rakontoj pri akvo
- 10 Placo kun kolomboj en Dalian
- 12 *ORIGINALE VERKITAĴ:*
Musoj kunsidas
- 13 *POR KOMENCANTOJ:*
Antaŭ ol fari stultaĵon
- 14 *ESP-NOVAĴOJ*
- 15 25 *KORESPONDI DEZIRAS*
- 16 *ĈINAJ E-ISTOJ:*
Nia Bakin, nia lingvo
- 20 *REGIONO ĈIRKAŬ BOHAI-MARO:*
Naturdotita energia bazo
- 24 La lasta amo
- 26 *ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:*
Sur stepo de la Interna Mongolio
- 28 *SUR NIA LIBROBRETO:*
Amo en tempo de ftizo
- 29 *BELECO DE ĈINIO:*
En urbeto de jadaj skulptaĵoj
- 32 *KURANTAĴ AFEROJ*
- 34 En naciaj vilaĝoj de Pekino
- 37 Operaciato de molekulo
- 38 Verdigantoj de Funiu-monto
- 40 *EKONOMIE:*
Post reformado de la sistemo de ter-dispono
- 41 Junaj ĉinaj piedpilkistoj en Brazilo
- 42 *ĈINA KULTURO:*
Ŝipfarado en la antikva Ĉinio
- 44 Kontakto kun tibetanoj
- 46 Ĉina tombejo en Jemeno
- 47 Helpe de legantoj
- 48 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 49 Surdamuta baletistino kaj ŝia instruistino
- 50 *GALERIO:*
Elefanta vinkruĉo
SUR LA KOVRILO:
S-ro Bakin kaj liaj familianoj
Foto de **Lu Zhengwei**
- 2 Floroj en vintro
SUR LA DORSKOVRILO:
[ĈINAJ POŝTMARKOJ]
Rododendro

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Taklimakan (p. 6)
2. Funiu-monto (p. 38)
3. Shifosi (p. 29)
4. Jiuzhaigou (p. 44)
5. Wuhu (p. 49)



Geedzoj kaj domlaboroj

ONI rigardas sian hejmon kiel ĝojplenan neston. Sed multaj rigardas ĝin kiel ŝarĝon pro tio, ke dum tre longa periodo en la malnova Ĉinio la virinoj, kiuj havis nenian socian pozicion kaj ekonomie dependis de sia edzo, povis fari nenion alian ol sin okupi pri kuirado kaj zorgado pri siaj edzo, infanoj kaj bogepatroj, tial mastrumado kiel peza ŝarĝo falis sur la ŝultrojn de la virinoj.

En la pasinta duonjarcento la ĉinaj virinoj havis radikalan ŝanĝiĝon en la socia pozicio, sed estis malfacile plene ŝanĝi la malnovajn konceptojn kaj kutimojn de la homoj. Nemalmultaj virinoj havis laboron en la socio, tamen, hejme ili ankoraŭ estis ĉefaj domlaborantoj. Nun Ĉinio estas en granda ŝanĝiĝo kaj ankaŭ okazas ŝanĝiĝo en miloj kaj miloj da familioj, ekz., en aranĝo de familiaj en- kaj elspezoj, edukado al infanoj kaj mastrumado.

RACIA ARANĜO DE FAMILIA ENSPEZO

Estis familio el edzo kaj edzino. En tri jaroj la geedzoj metis siajn salajrojn kune kaj rajtis elspezi ilin laŭbezone.

Iutage s-ro Xiao Wang informiĝis, ke lia patro en malproksima vilaĝo forpasis pro malsano. Li estis petita reveni al la vilaĝo kun 3 000 juanoj por la funebra cere-

monio. Kiam Xiao Wang trovis, ke ili ambaŭ havas nur kelkcent juanojn, li riproĉis sian edzinon, ke ŝi elspezis senplane. La geedzoj kverelis inter si. Li do devis reveni al la vilaĝo kun pruntita mono.

Poste iu amiko proponis al Xiao Wang, ke li apliku la AA-sistemon universalan eksterlande. Ĉiumonate 80 procentoj de iliaj salajroj estu uzataj por ĉiutaga elspezo, edukado al infanoj, vivtenado de maljunuloj kaj deponado, kaj la aliaj 20 procentoj disponataj je libera elspezo. Praktikante la metodon, Xiao Wang kaj lia edzino neniam kverelis inter si pro elspezo. Kiam venis festotago kaj naskiĝtago, ili aĉetis donacon unu por la alia per sia propra mono.

Menciindas, ke de miloj da jaroj la ĉinoj alte taksas la familian etikon kaj staras por la kriterio "dividi inter si ĝojon kaj suferon". En la plejparto de la ĉinaj familioj unu el la geedzoj respondecas pri financaj aferoj kaj ili interkonsiliĝas pri la familia elspezo. La edzo aŭ edzino kun pli da salajro ne havas privilegion fari ĉion sen interkonsiliĝo. Kreskas la nombro de edzinoj, kiuj enspezas pli multe ol la edzoj. Pli da profesiaj virinoj ludas gravan rolon en la familio.

En Ĉinio, kvankam oni plialtiĝis la salajron de multaj entreprenoj, tamen sennombraj familioj ne estas riĉaj kaj ankoraŭ devas elspe-

zi laŭplane. Iuj duhomaj familioj kun monata enspezo de 1 000 juanoj devas ankaŭ vivteni la (bo)gepatrojn, aĉeti vestojn kaj aliajn objektojn kaj gastigi amikojn kaj parencojn, krom la regula elspezo por akvo, elektro, gaso kaj manĝo. Rezulte la monata salajro estas preskaŭ tute elspezita. Ili do enskribas la en- kaj elspezojn en la familian konton por ŝpari monon, per kiu ili aĉetos porhejmajn elektrajn aparatojn aŭ kiun ili deponos en banko.

KUNA EDUKADO AL LA INFANOJ

Naski kaj eduki infanojn signifas malfacilaĵon por ĉiu familio, por ne paroli pri malfacilaĵoj en gravedeco kaj nutrado fare de la patrino. Kiam la infanoj vizitas lernejon, la gepatroj kompreneble devas ludi la rolon de "la unua instruisto".

En la antikva Ĉinio la virinoj havis malaltan kleracon, la infanoj estis edukataj ĉefe de la patroj kaj kulture kaj morale kaj la patrinoj prizorgis la infanojn en manĝado kaj vestado. Tial cirkulis la diroj "tenera patrino kaj severa patro" kaj "la patro respondas por la konduto de sia filo". Nun, kun plialtiĝo de kleraco la virinoj plejparte bone scias la devon eduki siajn infanojn kaj kune kun sia edzo plenumas la devon.

Iu paro da geedzoj kun solfilino donas grandan atenton al klerigado de la filino ekde ties infaneco. Kiam la filino estis pli-ol-tri-jara, ili trovis ŝin kantema. Do la geedzoj lernigis al ŝi infanajn kantojn kaj poemojn. Malpli ol unu jaron poste, la filino scipovis kanti 20 infanajn kantojn. Post kiam ŝi eniris infanĝardenon, la gepatroj ofte lernigis al ŝi ludi ŝakon aŭ amuzi sin per ludiloj. Kiam ŝi vizitis elementan lernejon, ili lernigis al ŝi belskribadon. Dank' al tio, ŝi gajnis la unuan lokon en la unuaklasa belskriba konkurso. Poste, la gepatroj sendis ŝin al infana belarta lernejo, por ke ŝi pli-malpli sciu pri ĉinstilaj pentraĵoj kaj lignogravuraĵoj. Ŝia lignogravuraĵo "Skizo de

amuzejo” estis eksponata en la urba ekspozicio de infanaj pentraĵoj.

La geedzoj penadis por havigi al la filino bonajn moralajn kaj kutimojn. Kiam ŝi lernis en la elementa lernejo, ŝi gajnis la plej bonan poentaron en ĉiufoja ekzameno. Montrante la ekzamenan paperon al siaj gepatroj, ŝi ĉiam fieris. Tion vidinte, la patrino rakontis al ŝi la rakonton “Konkurso inter testudo kaj leporo”. Tiel la filino bone komprenis, ke oni neniam devas fieri. Poste la filino estis elektita kiel bona lernanto ĉiujare.

Iu inĝenierino okupiĝis pri sia laboro tage. Vespere ŝi ekzamenis la hejmtaskon de sia filo kaj reĝustigis lian prononcadon de fremdlingvaj literoj. Poste ŝia filo sukcesis trapasi la eniran ekzamenon por universitato.

KUNA MASTRUMADO PREFERATA

Laŭ tradicio de Ĉinio la viroj

devis okupiĝi pri “granda afero” en la socio, dum la virinoj tutkore mastrumis en la hejmo. Sed en la nuna tempo ŝanĝiĝis la koncepto. Kaj la viroj kaj la virinoj povas fari “grandan aferon” en la socio, kaj plie, multaj viroj okupiĝas pri mastrumado.

Je mencio pri sia edzo, Wang Fu, kompetenta profesiulino, ekraĉis de ĝojo. Ŝi diris: “Antaŭ 20 jaroj mi diplomiĝis el universitato kaj edziniĝis al ŝoforo laboranta en ĝi. Dekojn da tagoj post la naskiĝo de mia filino, mi estis sendota eksterlanden por studi. Mia edzo prenis sur sin la taskon flegi la infanon. Post du jaroj, kiam mi revenis al Ĉinio, li prezentis antaŭ mi la filinon sanan kaj gajan.”

“Kvankam mia edzo ne estas riĉa nek talenta, tamen li estas vera viro en miaj okuloj.” Ŝi estas okupita kaj ankaŭ ŝarĝita per gvida laboro. Ŝia edzo faras mastrumadon anstataŭ ŝi. Ŝi estas neniam ĝenata pro ĉiutagaj necesoj, flegado al maljunuloj kaj preparado

por vojaĝo. Ĉiutage, kiam ŝi revenas hejmen post laboro, ŝi vidas la ridantan vizaĝon de sia edzo, aŭdas la dolĉan voĉon de sia filino kaj prenas vespermanĝon jam pretigitan de sia edzo. Tiam ŝi sentas grandan ĝojon.

Je tio Wang Fu emociiĝis, dirante: “Efektive, tiel ni kunlaboras.”

Estas multaj tiaj virinoj, kia Wang Fu, dum multaj viroj, kiuj sukcesis en la kariero, havas bonan edzinon, kiu plenumas mastrumadon. La geedzoj kune mastrumadas laŭ labordivido. La edzo faras penigajn domlaborojn kaj la edzino la malpezajn, kiaj aĉetado, kuirado kaj purigado. Iuj edzinoj eĉ tajlas vestojn por siaj edzoj kaj infanoj kaj por si mem.

Koncernaj enketoj montras, ke plejparto de la familioj povas bone aranĝi la ĉiutagan vivon kaj la laboron. En festotagoj iuj familioj faras aĉetadon aŭ ekskurson por gajigi sian vivon. ■

La patrino helpas sian filon en lernado



En la dezerto Taklimakan

de DONG YUELING



La vasta dezerto Taklimakan kuŝas en la okcidenta parto de Ĉinio. Ĝi estas unu el la plej misteraj kaj plej allogaj dezertoj de la mondo. Pro sia vasteco kaj dangereco ĝi fariĝis unu el la plej malmulte vizitataj lokoj de la mondo.

Meze de septembro 1994, la unua ĉina virina ekspedicio ekiris de 5 riveroj ĉe la suda ekstremo de la dezerto kaj sin direktis al la centra regiono de la dezerto. Post pli-ol-duonmonata penado ili sukcese plenumis sian esploradon kaj propraokule vidis la veran fizionomion de tiu mistera loko.

La Red.

CE la suda ekstremo de Taklimakan fluas 5 riveroj, kiuj enfluas en la dezerton. Ili estas la riveroj Hotan, Keriya, Niya, Yawatongguz kaj Andir. Eble estis la unua fojo por tiuj ĉi riveroj konduki aron da virinoj al esplorado.

Nia ekspedicio konsistis el unu altlerneja instruistino, unu ŝtatoficistino, unu junulino kaj du ĵurnalistinoj. Laŭ la plano ni devis fini la vojaĝon sur plejparto de la riveroj en duonmonato.

VIRINA EKSPEDICIO AL LA DEZERTO

El la 5 riveroj sole Hotan povas traflui la dezerton dum pluva sezono kaj enfluas en Tarim-riveron. Pro tio ĝi estas vojo ofte irata por ekspediciado sur la dezerto de la lastaj jaroj. Tamen ĝuste ĝi preskaŭ kondukis nian ekspedicion al malsukceso.

Niaj celokoj estis Mazartag-monto kaj antikva kastelo en la centra regiono, kiuj distancas je 200 km for

de la rando de la dezerto. La inundo, plej granda en la pasintaj 10 jaroj, multe detruis la vojojn ĉe la rivero. Forlasinte la lastan vilaĝon ĉe la dezerto, nia aŭto profunde sinkis en sablon. Malgraŭ ke la motoro bruegis, la aŭto neniom moviĝis. Ni klopodis pli ol unu horon kaj fine movis la aŭton, sed veturinte kelkajn metrojn, ĝi denove sinkis. En areo kun periferio de iom pli ol 10 m la aŭto sinkis 4 fojojn. Ni ĉiuj anhelis kaj falis en malesperon.

Tiam alproksimiĝis traktoro kaj 4 ĵipoj. Oni diris al ni, ke ili volis transiri Hotan, tamen pro la malfacila vojo ili devis turni sin malantaŭen. Trovinte nin en embaraso, ili konsilis al ni iri returne, dirante: “Vi, virinoj, se plu iri, vi certe falos en seneliron.”

“Ĉu ni iros antaŭen aŭ turnos nin malantaŭen?” Tion devis decidi nia grupestro Liu Xiaojing. Ŝi silentis dekelkajn minutojn. Mi pensis, ke ŝi volas plenumi la planon kaj nepre devas garantii la sekurecon de ĉiuj ekspedicianoj. Post longa cerbumado ŝi fine decidis daŭrigi la iradon.

ANTIKVA URBO

La antikva urbo Xiaobaigongyang, kiun ni estis vizitontaj, troviĝis en la malsupra baseno de Andir kaj nun ĝia ruino estas dense ĉirkaŭita de sablaj montetoj. Tien nia aŭto neniel povis eniri. Ni do luis ĉevalon, azenon kaj mulon de proksimaj loĝantoj.

Ni ekiris frumatene de la distrikto Andir. Forlasinte la vilaĝon ĉirkaŭitan de popoloj, ni tuj vidis senliman dezerton. Tie vidiĝis nur tamarikoj kaj sablaj montetoj, ne aŭdiĝis birda kantado nek insekta ĉirpado. Aŭdiĝis nur venta siblado. Sur dezerta vojo ni sentis solecon.

Tagmeze ni atingis la antikvan urbon de Tang-dinastio (618-907). La urbo, kun areo de 10 hektaroj, tute ruiniĝis kaj vidiĝas nur lignaj tegmentoj kaj detruitaj muroj. Rigardate de malproksime, distingeblas kabanoj, stratoj kaj eĉ konturo de la urbo.

La urba pordego el ŝtipoj kaj lignaj najloj estas ja sendifekta. Ĝi duonmalfermiĝas al okcidento. La tieaj loĝantoj en- kaj eliris tra ĝi siatempe kaj fine venis la tago, kiam oni forlasis la urbon kaj ne plu revenis, dum la pordego restis malfermita por eterne.

La urbo ne estas tiel fama, kiel Loulan kaj Niya englutitaj de sablo, tamen ĝi estas unu el la dudekkelkaj urboj de Han- kaj Tang-dinastioj en la centra regiono de la dezerto. Ĝuste tiuj antikvaj urboj interligiĝas unu kun alia kaj formis la Silkan Vojon.

YAWATONGGUAZ-VILAĜO

Ĉe la ekstremo de la rivero Yawatongguz kuŝas samnoma vilaĝo, kiu etendiĝas ĝis la dezerto. Oni iam nomis ĝin primitiva vilaĝo. Pro malfacila trafiko tre malmultaj vizitis ĝin. Ni devis iri laŭ la riverbordo. La flaŭro de la baseno de Yawatongguz-rivero estas la plej bona inter tiuj de la 5 riveroj. Tie vidiĝas aro post aro da eŭfrataj popoloj. Survoje paŝtiĝis ŝafoj kaj kameloj. La rivero ankoraŭ ne estas ekspluatita. Ĝi trafluas la vilaĝon kaj de tie daŭriĝas sian iradon dekojn da

La ekspedicio survoje



kilometroj.

Nia vizito vekis sensacion en la tuta vilaĝo. En la hejmo de la vilaĝestro ni kunestis kun vilaĝanoj kaj kune trapasis la plej ĝojan nokton en Yawatongguz. La vilaĝestro diris al ni, ke la vilaĝon tre malmulte vizitas fremduloj, kaj plie, la vizitantoj neniam kunestis kun vilaĝanoj. Oni rostis du ŝafojn kaj en la korto de la vilaĝestro faris fajron. Ni regalis la ĉeestantojn per bombonoj, kukoj kaj vinoj. Oni gustumis bombonojn, kantis kaj dancis ĉirkaŭ la fajro. Jen kaj jen aŭdiĝis ridado.

Ni tranoktis ĉe iu novgeedza paro kaj en la sekvanta mateno ni vekiĝis de kokerikado, bojado kaj henado en la vilaĝo.

EN LA DEZERTA CENTRO

La centra regiono de Taklimakan ampleksas 337.6 milojn da kvadrataj kilometroj. Movate de ventego, tie formiĝis ondantaj sablaj montetoj, kiuj kontinuas kvazaŭ en senlima maro. Alilokanoj ja ne povas imagi al si, kiel impone kaj grandioze ĝi aspektas.


Ĉe la ventego la dezerto fariĝas timiga. Tiam hurlas la vento kaj la ĉielon ŝirmas sablaj nuboj. Sablaj montetoj fluas tien kaj reen. La vento kun sablo furiozas kiel martajdo kaj tuj englutas la homojn. Kaj la oreloj, naztruoj kaj eĉ buŝo pleniĝas de sableroj.

En la helaj tagoj la dezerto ja estas aminda. Tagmeze la temperaturo estas ĉ. 40°C, dum matene ĉ. nulo. Ofte okazis, ke ni vekiĝis de frosto antaŭ la tagiĝo. Tiam ni atendis la sunleviĝon. La suno aspektis pli pure, brile kaj ronde. Ĝi varmigiĝis nin iom post iom kaj faris la dezerton senkompare bela kaj vigla.

En la unua vespero post nia alveno ni sidis ĝis la 12-a horo sur sabla monteto. Super ni la ĉielo estis senlima, brila kaj plena de steloj.

La kvietaj kaj senlima dezerto ne nur apartigis nin de la bruoplena mondo, sed ankaŭ vekis ĉe ni la longe dormantan instinkton al la naturo. Tiam ni vere komprenis, kial Taklimakan signifas "hejmloko" en la ujugura lingvo. ■

La pordo de la antikva urbo Xiaobaigongyang





La elektra-irigacia konstruo de Jingqinchuan

LI XIA:

Gansu: rakontoj pri akvo

MULTAJ homoj scias la mondfaman Mogao-kavernaron en Dunhuang, kiu unuigis pikturon, skulpturon kaj arkitekturon. Tamen ili ne scias la sekreton, ke la kaverno, farita en la jaro 366, ĝis nun bone konserviĝis pro sekeco kaj malmulta pluvo, nek ke ĝuste tia klimato rezultigis la miljaran malriĉecon de Gansu-provinco.

Terure mankas akvo-riĉfontoj al Gansu-provinco, kie la jara pluvokvanto estas 30-800 mm, dum la vaporiga kvanto de iuj lokoj estas 2 500-3 000 mm. Pro sekeco kamparanoj de la provinco elfaris norion por konduki akvon el la Flava Rivero por irigacii kampojn. En la 50-aj jaroj la tieaj kamparanoj ankoraŭ uzis la malnovan norion. Sed ĝi neniam savis la lokanojn el malriĉeco.

En la pasintaj 45 jaroj la ĉina registaro senĉese penadis por akvoutiliga konstruado en Gansu: ĝis la fino de 1993, en la tuta provinco estis bridita perdo de akvo kaj grundo kun areo de 49 000 kvadrataj kilometroj, solviĝis la problemo de trinkakvo por 30 000 000 loĝantoj kaj 3 020 000 brutoj kaj formiĝis akvoutiliga sistemo kun irigaciaj, inundopreventaj, elektroproduktaĵaj kaj akvoliveraj ekipaĵoj kiel la ĉefaj. Malantaŭ la supre menciitaj ciferoj estas rakontoj pri akvo.

POSTULI AKVON DE LA FLAVA RIVERO

En Gansu multaj lokoj, kie multe mankas akvo, estas nomataj per "akvo". La de ni vizitita vilaĝo meze de la provinco portas la nomon "Manshui", kiu signifas senliman akvon. Tiam estis la aŭtuno de 1994. La suno brilis kaj la aero freŝis. Ĉe la vilaĝo kreskis aro da poploj kun maldikaj trunkoj kaj flavetaj folioj. La brikaj domoj estis lavitaj de pluvo. Tio ja estas plansetlejo aparta en Gansu.

En la plansetlejo loĝas kamparanoj el pluvomanka montregiono. Antaŭ 3-4 jaroj ankaŭ tiu loko estis seka kaj dezerta, kaj tie neblis vivi por homo kaj bruto. Post kiam stariĝis la elektra-irigacia konstruo Jingqinchuan, oni kondukis tien akvon de la Flava Rivero, kaj poste tie aperis verdaĵo kaj enloĝiĝis kamparanoj.

Kamparano Huang Yuman antaŭ nelonge konstruis brikon loĝejon kun 10 ĉambroj. La mono por tio devenis parte de helpo de la ŝtato por la setlado, plejparte de lia transportado. Li posedas traktoron por transporti lupolon. Li diris, ke 235 familioj de la vilaĝo transloĝiĝis el montvilaĝo je pli ol 100 km fore. En 1974 finiĝis la unua periodo de la projekto de la elektra-irigacia konstruo Jingqinchuan, kiu irigaciis kampojn kun areo de 20 400 hektaroj. Post 1986 montvilaĝanoj transloĝiĝis tien unuj post aliaj. Ili plantis arbojn,

konstruis domojn, ekspluatis teron kaj starigis lernejon en la loko. Ĉio ĉi tio iris laŭ la ŝtata plano "transloĝiĝi en unu jaro, fiksloĝiĝi en du jaroj kaj solvi la problemon de vestoj kaj manĝaĵoj en 3-4 jaroj".

S-ro Li, vicĉefkomandanto de la konstruado, konigis al ni la pli gojigan duperiodan konstruon. La konstruo komenciĝis julie de 1984 kaj finiĝis fine de 1993. La akvonivelo de la Flava Rivero estis altigita averaĝe je 460 metroj, ĉ. 33 000 hektaroj da kampoj estis irigacitaj kaj mikroonda, portonda, altfrekvenca telekomunikaciaj linioj ekfunkciis tra la tuta irigaciejo. Jingqin-gubernio, kiu antaŭe sin vivtenis per greno liverata de la ŝtato, nun vendas ĉiujare al la ŝtato pli ol 17 milionojn da kg da greno. En ĝia najbara Gulang-gubernio la pokapa produktokvanto de greno en 1993 estis pli ol 400 kg. En la irigaciejo oni plantis sur areo de 53 300 hektaroj 31 790 000 arbojn, kiuj ligiĝis kun la nordokcidenta, norda kaj nordorienta kampŝirmaj forstoj kontraŭ Tenger-dezerto en nordo.

IRIGACIA KONSTRUO

Oni faris grandiozan irigacian konstruon, kiu kondukas akvon de Datong-rivero de Qinghai-provinco al kampoj de Qinqinwangchuan, 60 km norde de Lanzhou, Gansu-provinco.

Unufraze oni parolis pri la konstruado daŭranta 18 jarojn. Fakte, ĝi konsumis multe da mono, gran-

dajn laborfortojn kaj eĉ vivon. Ĝi konsistas el kanaloj kun totala longo de 205.7 km, 71 tuneloj kun totala longo de 110 km, 29 akveduktoj kaj 3 inversaj sifonegoj.

La 10-an de oktobro 1994 estis lanĉita la trunka kanalo 87 km longa. Ĉar la Monda Banko pruntedonis monon, kamparanoj ĉiutage povis ricevi 2.5 kg da greno kaj subvencion por vivtenado kaj montriĝis tre energiaj en la konstruado. Iu videobendo prezentis tian scenon: iu mode vestita junulino kun rido sidas sur terlito, kaj apud ŝi estas ŝia edzo. La videoregistrinto diris, ke ŝi venis de riĉa loko, tamen ŝi edziniĝis al kamparano-laboranto, ĉar li havas monon kaj konas la eksteran mondon. Nemalmultaj kamparano-laborantoj kun novedzino revenis hejmen post la konstruado.

Tio, kion la konstruo alportis al la kamparanoj, estas ne nur greno kaj edzino, sed ankaŭ pli favoraj vivkondiĉoj — post ekfunkciado de la konstruo ĉiujare oni povos konduki akvon el Datong-rivero por irigacii ĉ. 57 000 hektarojn da kampoj. Tien transloĝiĝos 80 000 loĝantoj de malriĉaj lokoj de Gansu-provinco, kaj estos solvebla la problemo de vestoj kaj manĝaĵoj de pli ol 300 000 kamparanoj. La konstruo ankaŭ ligiĝos kun la elektra-irigacia konstruo Jingqinchuan, kaj tiel formiĝos altpro-

dukta grena bazo de la supra baseno de la Flava Rivero kaj la agrikultura kaj manĝaĵa bazo de la urbo Lanzhou. Plej grave estas, ke dank' al la ĉiufanka disvolvigo de la regiono Qinwangchuan, la verdaĵo norde de Lanzhou plibonigos la tian ekologian medion.

ADIAŬ AL NORIO

La gubernio Dingxi, grava paŝejo sur la antikva Silka Vojo, famas pro sia malriĉeco kaj sekeco. La Dingxi-anoj neniam forgesos la sekecon en 1982. Tiam ĉiutage oni uzis 100 noriojn por preni akvon por loĝantoj. En la historio de Dingxi sennombraj homoj mortis de sekeco kaj malsato.

Komence de la 80-aj jaroj la montoj en Dingxi restis kalvaj. La Dingxi-anoj ankoraŭ vivis el greno donacita de la ŝtato.

Pasis kelkaj jaroj. Verdiĝis Dingxi: aperis arboj sur montoj, kreskas plantoj sur kampoj kaj etendiĝas verdaĵoj antaŭ domoj de kamparanoj. Je mencio pri la ŝanĝiĝo de Dingxi oni ne forgesis, ke en 1982 la registaro decidis ĉiujare asigni monsumon speciale por solvi la problemon de vestoj kaj manĝaĵoj kaj difinis Dingxi kiel unu el la ĉefaj konstruataj gubernioj; en 1983 la ŝtato proponis al Gansu "planti arbojn kaj herbojn kaj disvolvi brutobredadon kaj paŝtadon por likvidi malriĉecon" kaj alvokis

urbajn loĝantojn kolekti arbo- kaj herbosemojn por sendi ilin al Dingxi; en la sama jaro Dingxi estis enlistigita de la ŝtato kiel unu el la ok ĉefaj regionoj, kiuj devas esti reguligitaj por konservi akvon kaj grundon, ankaŭ la registaro de Gansu-provinco decidis "fini detruadon al flaŭro en 3 jaroj, solvi la problemon de vestoj kaj manĝaĵoj en 5 jaroj"; en 1985 la sinteza reguliga konstruo de Dingxi por konservi de akvo kaj grundo en la baseno de Guanchuan-rivero estis enlistigita kiel softa kredita programo de la Monda Banko.

Dum 1983-1993 en la unua periodo estis reguligitaj la basenoj de 46 malgrandaj riveroj, kiuj kovras 1 836 kvadratajn kilometrojn, t.e. 50% de la totala areo de Dingxi-gubernio. En 1993 komenciĝis la dua periodo por reguligi la basenojn de 85 malgrandaj riveroj kun areo de 1 316 kvadrataj kilometroj. Certe parto da Dingxi-anoj suriros sur riĉiĝan vojon.

Ni vizitis la ordinaran familion de vilaĝano Li Yong. Kelo kun akvorezervujo en la korto vekis nian intereson. Tio estas invento de Dingxi-anoj por postuli akvon de la ĉielo.

Tie ĉiu familio havas tian kelon. Tra tubo laŭ tegmento-rando somera pluvo kaj vintra neĝo venas sub la teron kaj konserviĝas en rezervujo. Kiam okazas sekeco, oni prenas akvon el la rezervujo. Laŭ kontrolo de higiena departemento la akvo en la rezervujoj estas trinkebla. Do la registaro monhelpis tieajn kamparanojn por fari pli ol 60 000 akvorezervujojn, meznombro unu familio posedas 2.5 akvorezervujojn. De 1984 ĝis nun la registaro de Dingxi neniam uzis norion por preni akvon.

Dum mi finas mian artikolon, daŭras rakontoj pri akvo en Gansu-provinco. Ni informiĝis de la Akvoutiliga Departemento de la provinco, ke estas ellaborataj grandaj akvoutiligaj projektoj. Ili estas la ekspluata kaj konstrua projekto de Shule-rivero, la konstruo konduki akvon de Taohe-rivero kaj la pivota akvoutiliga konstruo de Jiudianxia-gorĝo. ■

La trunka kanalo, kiu kondukas akvon el Datong-rivero



Placo kun kolomboj en Dalian

Fotoj de LIU SIGONG

Flugo en la aero



Kolomboj kaj malnova reliefo

Urbaj placoj kun kolomboj ne estas malmultaj en la eŭropaj landoj. Sed tio estas malofte vidata en Ĉinio.

En la urbo Dalian de Liaoning-provinco estas Popola Placo. Antaŭ du jaroj oni komencis bredi kolombojn por la placo. Ĉe la komenco oni ne tuj rimarkis la novaĵon, kaj nun miloj da kolomboj flugas super la placo. En ferioj urbanoj ofte venas al la placo por rigardi la kolombojn. Tie estas standoj de kolomba nutraĵo, kaj kontraŭ malgranda sumo da mono oni povas akiri saketon da kolomba nutraĵo. Oni ŝatas foti sin, nutrante kolombojn. La placo kun kolomboj estas frekventata de urbanoj de Dalian.



Knabino kaj kolomboj

Sur la placo



Musoj kunsidas

de LAŬLUM

Laŭlum estas pseŭdonimo de Li Shijun, membro de la Akademio de Esperanto kaj emerita vicĉefredaktoro de "El Popola Ĉinio". De post la komenco de la 80-aj jaroj li verkis nombron da infankantoj kaj aliaj simplaj versaĵoj por faciligi al komencantoj la lernadon de Esperanto. Kaj liaj verkoj estas enmetitaj en "222 Simplajn Versaĵojn por Komencantoj", el kiuj iujn ni aperigis sube. Pri la aŭtoro bonvolu legi la artikolon "Esperantologo, Mentoro kaj Tradukisto Li Shijun" en la dua numero de 1995.

La Red.

Saluton

Saluton!
Saluton!
Atendu minuton!
Komencu ni ludon!

Vespera stelo

Vespera stelo
kiel espero
belege brilas
sur la ĉielo

Rido sanigas

Rido sanigas,
rido junigas,
rido amikojn
gaje kunigas.

Vivo senrida
estas mucida;
vivo ridriĉa
estas feliĉa.

Kalkulu

Unu, du, tri!
Kalkulu ni!
Kvar, kvin, ses!
Diru jes!
Sep, ok, naŭ, dek
Kalkulu, tuj ek!

Gravas infanĵaroj

Infanĵaroj
tre tre gravas.
Ĉiuj faroj
sekvon havas:

Se vi perdos
tempon lude,
do vi spertos
vivon krude.

Se vi studos
diligente,
vi debutos
eminente.

Bonan tagon

Bonan tagon, amiketo!
Iru kun mi al ĝiceto
por aĉeto de bileto
kaj rigardo de baletto.

Pacvolo

Li vivas en Meksiko,
mi vivas en Ĉinlando.
Fariĝis ni amikoj
per kara Esperanto.

Ni longe korespondas,
leteroj niaj montas.
Mi pri la Granda Muro;
li pri sia kulturo.

El tio ni profitas,
ĉar ni pli klare vidas:
tutmonda la popolo
plenas je pacvolo.

Pino

Ventego muĝas, neĝo falas.
kun ili pino penbatalas.
Post paso de la neĝoŝtormo,
la brava pino rekte staras.

Bestĝardeno

Bestĝardeno — bona loko:
Pavo belas pli ol koko.
Tigro fortas, urso sportas,
bambuŝoson pando mordas.

Simietoj tre tre viglas
kaj ĉimpanzo eĉ biciklas.
Per la rostro, elefanto
lerte ludas kun dresanto.

Ĉe lagbordo krokodilo
duondormas en trankvilo.
Sur la akvo cignoj naĝas.
Tiu bildo okulplaĉas.

En la zoo ĉarmas floroj,
ĉie svarmas spektatoroj.

Musoj kunsidas

Musgepatroj kaj gefiloj
jen kunsidas por konsiloj.
Varme iras diskutado:
"Kion fari kontraŭ kato?"

"Ni pendigu tintileton
al la kata kolo.
Se li ŝtele alpaŝetos,
estos tintsonoro."

Ĉiuj musoj ekridetas
pro la saĝa diro.
"Kiu tion fari pretas?"
Ekregas maltrankvilo.

ESTIS la somero de 1959. Mi ricevis en malgranda gastejo laboron deĵori nokte ĉe servotablo kaj doni furagon en ĉevalejo. Ĉiunokte, kiam mi deĵoris, la baldaŭ hejmenrevenonta mastro avertis min sen ĝentileco: "Ne neglektu, mi kontrolos ĉiutage!" Tiam mi, 22-jara, ĵus diplomiginta el universitato, tre malkontentis pri la mastro, kiu neniam ridis al mi.

Unu semajno pasis. Neniom ŝanĝiĝis la ĉiutaga tagmango. Ju pli mi manĝis, des pli mi enuis. Oni eĉ dekalkulis la manĝpagon el nia salajro. "Faŝisto, certe!" Estis malfacile por mi toleri tion plu.

Mi estis kolerigita. Ne troviĝis homo, al kiu mi povis elverŝi mian koleron. Mi nur povis plendi al Sigmund Walman, kiu prenis deĵoron de mi. Mi deklaris: "Certe venos la tago, ke mi verŝos tiel aĉan manĝaĵon sur la vizaĝon de la mastro."

POR KOMENCANTOJ

Antaŭ ol fari stultaĵon

Mi fariĝis pli kolera. El mia buŝo elverŝiĝis torento da plendoj por ĉ. 20 minutoj, dume aŭdiĝis sonoj de tablofrapado kaj trivialaj blasfemoj. Fininte tion, mi subite rimarkis, ke Sigmund Walman dum la proceso silente sidis tie kaj rigardis min per siaj okuloj plenaj de malĝojo kaj melankolio. Kompreneble, li havis centpocentan kialon malĝojiĝi kaj melankoliĝi, ĉar li estis judo, postvivinto el la koncentrejo Oswiecim, malgrasa kaj malforta, kaj senĉesa tuso kompaniis kun li en 3 jaroj. Ŝajne li preferis laboron en nokto, ke li povu ĝui kvietecon. Por li la plej granda ĝuo estis, ke neniu devigas lin fari ion.

"Aŭskultu, ĉu vi konsciis vian eraron?" diris Walman.

"En kio mi eraris?"

"Vi opinias, ke vi ĉion scias, sed fakte vi eĉ ne povas klare diferencigi malgrandan ĉagrenon kaj veran malfacilon. Se vi rompus al vi la kolon, se via stomako ĉiam malplenus, se ekbrulus via domo — tiuj ja estus grandaj malfaciloj. Ne ĉiuj aferoj iras laŭ via deziro. La vivo mem plenas de kontraŭdiroj. Lernu distingi, kio estas eta malsukceso kaj kio estas ega malfacilo. Ne koleriĝu pro bagatelo, tiamaniere ĉagrenoj malmultiĝos. Bonan nokton."

Lia parolado estis kiel piedbato al mi, stultulo, kaj malfermis fenestron al mia koro.

Jam pasis 30 jaroj. Ĉiufoje kiam mi renkontis malfacilon aŭ malsukceson, kaj volis koleriĝi aŭ plendi, lia malĝoja vizaĝo aperis antaŭ mi kaj demandis: "Ĉu tio estas nevenkebla malfacilo aŭ eta malsukceso?"

Ofte ondiĝas maro de la vivo. Hordea griajo malmoliĝis, aŭ tumorino aperis en la torako, ili estas absolute diferencaj en graveco. Sed iuj ne povas diferencigi ilin, facile koleriĝas kaj faras stultaĵon. Bonan nokton, Sigmund Walman. ■



ESP-NOVAĴOJ



La ĉeestantoj skribas sian nomon sur verda silko por la 90-a datreveno de la naskiĝo de Bakin

● La 25-an de novembro 1994, la Ĉina E-Ligo, Societo “Amikoj de Esperanto”, redakcio de EPĈ kaj aliaj Esperantaj organizoj de Pekino kunsidis por festi la 90-an datrevenon de la naskiĝo de s-ro Bakin, fama verkisto kaj honora prezidanto de la Ĉina E-Ligo. S-roj Chen Yuan, Li Shijun, Hou Zhiping k.a. faris parolon en la kunsido. Ili alte taksis la noblan personecon de Bakin kaj lian kontribuon al Esperanto. Post la kunsido laborantoj de EPĈ kaj pli ol 30 ĉeestantoj skribis sian nomon sur verda silko kun la vortoj “Por festi la 90-an datrevenon de la naskiĝo de s-ro Bakin”, kaj poste oni sendis ĝin al li.

● Oktobre de 1994 okazis en Hangzhou, Zhejiang-provinco, la Unua Ĉina Filatela Ekspozicio de Kripluloj. Iu esperantisto el Hunan partoprenis en la ekspozicio kaj gajnis la 3-an premion per sia filatelo “Esperanto tra la mondo”. (Cui Haijing)

● La 25-an kaj 30-an de septembro 1994, la Ĉina Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis po unu serion da poŝtmarkoj pri la pitoreskejoj Wulingyuan (Ulingjūan) kaj Wuyi (Uji)-monto. En la du tagoj la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan uzis stampilojn en Esperanto kaj la ĉina lingvo. Ilia desegninto estas samideano Zhang Linrui.



La memorigaj poŝtstampoj lanĉitaj de la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio

● Oktobre de 1994, la Dandong-a E-Asocio de Liaoning ekfunkciigis E-kurson, en kiu lernis pli ol 30 lernantoj. (Liaoning-a E-Asocio)

● La 8-an de novembro 1994 la Changchun-a E-Asocio fondis Esperantan konsultejon kun informtelefono en la subtera bazaro ĉe la strato Hongqi en Changchun. Kaj samtempe oni dissendis propagandajn materialojn pri Esperanto. La konsultejo estis fondita helpe de esperantisto Fu Tao, estrino de la kosmetiko-vendejo de la bazaro. (Liu Minghui)


● De la 7-a ĝis la 16-a de oktobro 1994 okazis ĉe la haveno de Barcelono, Hispanio, tre grava ekspozicio de la kataluna kulturo, organizita de la aŭtonoma registaro “Generalitat”. En ĝi estis 130 standoj.


En la stando de la Asocio Regiona Lleida Centro estis montrita kolekto da esperantaĵoj, preparitaj de la Barcelona E-Centro. (Salvador Aragaj)

● Legio de Bona Volo (LBV), pere de ĝia prezidanto José de Paiva Netto, havas la honoron enkonduki la inviton por la Soleno de Inaŭguro de la Monda Parlamento de la Ekumena Frateco, kiu okazis la 25-an de decembro 1994 (Tago de la Paco) en Brazilio, la ĉefurbo de Brazilo. LBV — unu el la plej grandaj organizoj neŝtataj sub la Unuiĝintaj Nacioj (UNO) — lanĉas en la mondo ĉi tiun Ekumenan Parlamenton, kiu proponas la universalan interkonsiliĝon pri la tuta kono homa kaj spirita, per grandpova forto je la servo al la popoloj.

● La 1-an de oktobro 1994, la Japana Esperanto-Instituto okazigis la inaŭguron de sia nova seminariejo en arbaro 150 km for de Tokio, baptita Esperanto-Domo de Yatugatake laŭ la nomo de la montaro proksima de la loko, renoma pro la pitoreska pejzaĝo. Ĝi estas donaco de sinjorino MORITA Yoko, membro de JEI, kiu volis realigi la deziron doti la japanan movadon per studejo kaj ripozejo, longe trezoratan en la sino de ŝia forpasinta edzo MORITA Mosuke, ankaŭ esperantisto, kaj en la ŝia. En la soleno partoprenis pli ol 80 personoj. Oni legis mesaĝojn de John Wells, prezidanto de UEA, de Koreio kaj Ĉinio, kaj telegramojn el regionaj federacioj de Japanio kaj filioj de JEI.

Stando de Esperantaĵoj en la ekspozicio de la kataluna kulturo





La nova seminariejo de la Japana Esperanto-Instituto

Eksterlandaj esperantistoj vojaĝantaj estas bonvenaj en tiu ĉi domo. (YAMASAKI Seikō)

● En oktobro de 1994, komenciĝis la unua Kurso de Esperanto en la Lernejo de Filozofio de la Fakultato de Humanismaj kaj Edukaj Studoj de la Centra Universitato de Venezuelo en Karakas. La kurso estas nedeviga, sed la kursanoj, kiuj finos la studadon, gajnos 2 kreditojn, same kiel la kursanoj de la latina aŭ greka lingvoj. La kurs-gvidanto estas profesoro Johano Negrete.

En la Homeopat-medicina lernejo de Karakas Esperanto estas deviga studobjekto. (J.E.Bachrich)

● La 26-a Korea Kongreso de Esperanto kun ĉ. 170 partoprenantoj okazis en Seulo de la 29-a ĝis la 30-a de oktobro 1994. En la Kongreso la Korea Esperanto-Asocio (KEA) havis ĝeneralan kunsidon, kiu elektis novan estraron de KEA. S-ro Han Moo-hyup, la antaŭa prezidanto de KEA, estas elektita kiel honora prezidanto. Prof. Lee Chong-yeong oficas kiel prezidanto kaj s-ro Puramo Chong, s-ino Lee Hak-sun kaj s-ro Chung Han-kun kiel vicprezidantoj. S-ro Choe Taesok restas kiel sekretario.

Ekde 1995 KEA ne plu eldonos *La Espero* pro manko de subvencio kaj decidis monate aperigi la organon *La Lanterno Azia*, kiu ĝis nun aperas 6-foje jare.

● En Waldfischbach-Burgalben de Germanio, la 11-a Printempa Semajno Internacia (PSI) okazos inter la 14-a kaj la 21-a de aprilo 1995. PSI estas precipe familia seminario, kiu jam eniras la duan jar-dekon de sia ekzisto. La programo celas kontentigi samrajte plenkreskulojn, junulojn kaj infanojn, sed tio ne ekskluzivas unuopulojn, ĉiu estas bona, eĉ neesperantisto. La 11-a PSI enhavos kaj laborajn kaj distrajn elementojn, ekz. diskutgrupojn, kursojn pri manlaboroj, artojn, naciajn kutimojn, lingvajn kursojn, ekskursojn, video-filmojn ktp. Aliĝoj kaj informoj ĉe: Germana Esperanto-Asocio, Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler. Telefono: +49-02641-4885. Telefakso: +49-02641-9786-66 (Franz Kruse)

● La 68-a SAT-Kongreso okazos en Maribor, Slovenio inter la 15-a kaj 22-a de julio 1995. La ĉeftemo

de la Kongreso en la Internacia Jaro de Tolero laŭ UN estos "Tolero al minoritatoj". Pri la temo prelegos deko da homoj. La 68-a Kongreso estos plena je nekutimaj programoj, ekz. internacia koruso kaj orkestro, futbala maĉo inter SAT-a kaj ne-SAT-a junularoj, amatora teatra festivalo, video-festivalo ktp. Krome okazos regulaj SAT-kongresaj programoj: ĉefkunvenoj, kunvenoj de SAT-frakcioj ktp. Antaŭ la kongreso oni aranĝos turisman antaŭkongreson de la 9-a ĝis la 15-a de julio 1995 "Alpa Slovenio". Estos vidataj ĉiuj alpaj vidindaĵoj de Slovenio kaj loĝos en bela ĉelaga hotelo kun programoj en salonoj de malnova kastelo. Petu aliĝon kaj detalan informon ĉe INTER-KULTURO 62000 Maribor, Kocevarjeva 12, Slovenio (tel/fakso: +386-62-221371) aŭ ĉe SAT en Parizo.

(Zlatko Tišljar)

● La germana Fondaĵo "FAME" asignis al "Heroldo de Esperanto" kaj al la verkistino Spomenka Štimec la kultur-premion 1994 (po 5 mil markoj), pro ilia kontribuo al la disvastigo de kulturaj verkoj kaj subteno de internacia kompreniĝo. La monda sendependa gazeto HdE (16 numeroj jare), fondita en Kolonjo en 1920 de Teo Jung kaj honorofice redaktata, de 1961, de Ada Fighiera-Sikorska, ĝis nun aperis preskaŭ 1 900 fojojn en pli ol ses milionoj da ekzempleroj entute: ĝi estas dissendata al ĉ. 70 landoj: multaj legantoj en neevoluintaj landoj ricevas ĝin senpage. En sia 73-jara vivo, "Heroldo" eldonis ĉ. 100 Esperantolibrojn kun pli ol 20 000 paĝoj entute. Famaj fariĝis ĝiaj modernaj lernolibroj, plurfoje reeldonitaj en Esperanto, angla, hispana, franca kaj itala lingvoj; german-lingva lernolibro estas en preparo. Adreso: HeE, Red. Ada Fighiera-Sikorska, Via N. Sandre 15, I-10078 Venaria R. (Torino), Italio.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50. da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

*Klubo ESPERANTO, PK 61 en Polski Trambes, Bulgario, dez. kor. en la tuta mondo pri ĉt. kaj serĉas materialojn pri varbekspozicio.

*Kunshan Esperanto-Ligo dez. kunlabori tm. kun E-organizoj en ekonomio, komerco, medicino, tekniko kaj kulturo. Respondo garantiata. Adr.: Tao Xueqi, Culture Bureau, 62, Xijie, CN-215300 Kunshan, Jiangsu, Ĉinio.

*Filatelista Klubo de Esperanto dez. kolekti kaj interŝanĝi diverslandajn p.m. kaj E-gazetojn, kor. kun E-organizoj kaj e-istoj. Adr.: Fu Guoqing, Harbin Dianjichang 10-chejian CN-150040 Harbin, Heilongjiang, Ĉinio.

*Grupo da viglaj gejunuloj dez. kor. tm. pri medicino kaj kolektas b.k., p.m. ktp. Adr.: Junulara Esperanto-Sekcio de Chengde-a Medicina Instituto, CN-067000, Chengde, Hebei, Ĉinio.

*34-jara fraŭlo, bank-oficisto dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Joao Manoel Aguilera Junior, Caixa Postal 120, BR-13001-970 Campinas-SP, Brazilo.

Nia Bakin, nia lingvo

de CHEN YUAN

Okaze de la 90-a datreveno de la naskiĝo de Bakin, la Ĉina Esperanto-Eldonejo aperigis la libron "Bakin kaj Esperanto" kompilitan de s-ro Xu Shanshu. Ĝian antaŭparolon verkis s-ro Chen Yuan, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo. Sube estas mallongigo de la antaŭparolo.

MULTAJ legantoj amas Bakin kaj liajn verkojn, kaj ni esperantistoj fieras pli pro tio, ke inter ni estas tia vera homo kiel Bakin. Li amas Esperanton dum la tuta vivo. Li enkorpigas en si la ideon de Esperanto. Li batalis por Esperanto pli ol 70 jarojn — kvankam plurfoje li modeste diris, ke li apartiĝis de E-movado jam antaŭlonge, tamen tio signifas nur, ke li ne plu ludis rolon de organizanto de E-movado. Oni ne devas postuli, ke ĉiuj esperantisto-erudiciuloj fariĝu organizantoj de E-movado. Efektive Bakin neniam forgesis Esperanton. Antaŭ 12 jaroj (1982) li diris: "Pasis pli ol 40 jaroj, dum kiuj mi travivis la ok-jaran Kontraŭjapanan Rezistmiliton kaj la

dek-jaran Kulturaran Revolucion, tamen mi neniam perdis amon al Esperanto." En 1921 la 17-jara Bakin verkis la artikolon "Karakterizaĵoj de Esperanto". Tiam li lernis nur abocon de Esperanto, sed kuraĝigita de la idealo de Zamenhof, li klopodis disvastigi la lingvon. Tri jarojn poste (1924) en Nankino li serioze lernis la lingvon. Li legis ĉiujn Esperantajn librojn troveblajn. En 1928 li studis en Parizo, kie li konatiĝis kun s-ro Hujucz. Ili starigis grandan amikecon inter si kaj kune malfermis novan paĝon de la ĉina E-movado.

En la pasintaj 70 jaroj liaj grandnombraj emociaj literaturaĵoj nutris liajn samtempulojn kaj ankaŭ multe da posteuloj. Ni esperantistoj fieras kaj miras, ke

krom verkado li ankaŭ ĉinigis el Esperanto fremdlandajn literaturaĵojn kun centmiloj da vortoj. Tio estas maloftaĵo por la ĉinaj verkistoj kaj esperantistoj.

Multaj legis lian romanon "Familio". Ankaŭ li mem amas ĝin. Li eĉ volis mem traduki ĝin en Esperanton. Emociita kaj edifita de "Familio", mi tradukis ĝiajn kelkdek paĝojn dum milita periodo. S-ro Ĵelezo kuraĝigis min tion daŭrigi kaj promesis, ke li helpos publikigi la tradukon. Sed bomboj de japanaj invadintoj detruis mian hejmon kaj ankaŭ mian tradukon. Feliĉe, mi aŭdis, ke antaŭ kelkaj jaroj iu esperantisto fintradukis la romanon kaj Bakin verkis antaŭparolon por la traduko. Bedaŭrinde la Esperanta versio ankoraŭ ne aperis ĝis nun pro iaj kaŭzoj.

La literaturaĵoj elesperantigitaj de Bakin inkludas la dramojn "La Floro de l' Pasinto" de E. de Amicis, "Danco de Skeletoj" de Akita Uĵaku kaj "La Morto de Danton" de A. Tolstoj. "Elektitaj Tradukoj de Bakin" kompilita de Bakin por Sanlian-eldonejo en 1988 ne enhavas la suprajn tri tradukojn. La libro konsistas el dek verkoj, el kiuj nur unu estas tradukita el Esperanto, nome "Printempo en la Aŭtuno" de Julio Baghy. Tiu milda kaj melankolia romantika rakonto emociis kaj konkeris junajn legantojn en la 30-aj jaroj. En la 50-aj jaroj mi foje renkontis la aŭtoron en Norda Eŭropo kaj esprimis al li dankon de mi kaj miaj samtempuloj. Kaj antaŭ kelkaj jaroj mi skribis al la tradukinto, ke mi ankoraŭ ŝatas "Familion". Li ĝoje respondis, ke ankaŭ li tre ŝatas la romanon. Mi neniam forgesos la vortojn en lia antaŭparolo: "Vivo plenas je printempo, printempo en aŭtuno, printempo en vintro kaj printempoj multaj kaj multaj."

Dank' al s-ano Xu Shanshu, kiu diligente laboris por kompili la libron "Bakin kaj Esperanto", oni povas facile legi ĉiujn elesperantigitajn tradukojn de Bakin. Bedaŭrinde s-ro Xu Shanshu forpasis

pro malsano antaŭ la apero de la libro.

En la 80-aj jaroj, malgraŭ siaj maljuniĝo kaj malsano, la 80-jara Bakin verkis 150 eseojn, kiuj estis enmetitaj en "Esearon", nomatan "libro pri veraĵoj", montris la konsciencan de nuntempaj ĉinaj intelektuloj kaj konkeris multajn legantojn.

El la 150 eseoj du temas pri Esperanto. Unu estas titolita "Esperanto" kaj la alia estas antaŭparolo por la Esperanta traduko de "Familio". Krome, en multaj aliaj eseoj troviĝas vortoj pri Esperanto aŭ esperantistoj. Tio montras lian konstantan amon al Esperanto. Li amas Esperanton, ĉar li amas la homaron kaj la estontecan. Li kredas, ke la estonteco estas bela.

En 1980 s-ro Bakin flugis al Stokholmo por partopreni la 65-an Universalan Kongreson de Esperanto. Tio surprizis liajn amikojn ĉinajn kaj svedajn. Li diris: "Antaŭ mia vojaĝo miaj amikoj admonis min, ke en tiel granda aĝo mi ne partoprenu tian kongreson. Ili ne sciis, ke en la pasintaj jaroj mi neniam perdis intereson pri la internacia lingvo. Kaj post la kongreso mi havas pli grandan fidon al Esperanto. Esperanto certe fariĝos komuna lingvo de la homaro."

En Stokholmo li diris al siaj svedaj amikoj: "Esperanto sendube disvolviĝos rapide, sed ĝi ludas nur rolon de komuna helpa lingvo, anstataŭante neniun nacian lingvon... Se ĉiuj ellernos Esperanton, aperos tute nova situacio en la mondo."

En la sekvanta kongreso Bakin fariĝis membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Tio estas la plej alta honoro en Esperantujo. Ĝin akiris nur tiuj, kiuj faris grandan kontribuon al E-movado kaj al la homa civilizacio. Bakin tute meritas la honoron.

Post lia reveno de Stokholmo ni havis ŝancon babili. Krom ni, kunsidis ankaŭ Hujucz kaj Ĵelezo, ŝajne ankaŭ Chun-Chan Yeh kaj

Zhang Qicheng. En la kunsido ni esprimis deziron gastigi en Ĉinio universalan kongreson. Tio estis la 71-a UK okazinta en 1986 en Pekino.

Bakin kaj Hujucz havis profundan amikecon inter si. Bakin diris: "Hujucz estis mia malnova amiko. Esperanto-movado kunligis nin. Nia amikeco daŭris ĝis lia lasta spiro, li ankoraŭ vivas en mia koro."

La unua letero de Bakin al Hujucz temas pri Esperanto. En 1920 Bakin vivis en Chengdu kaj Hujucz en Ŝanhajo. Tiam Bakin estis nur komencanto, dum Hujucz, redaktoro de "Orienta Revuo", plej fama ĉina periodaĵo, publikigis en ĝi siajn artikolojn pri Esperanto. En 1922, la tria jaro de ilia korespondado, Hujucz aperigis en ĝi sian longan artikolon "La Idealo kaj la Realo de Internacia Lingvo", kiu sisteme traktas Esperanton.

Hujucz vizitis Francion en 1928, kiam la tuta mondo festis la 100-an datrevenon de la naskiĝo de Lev Tolstoj. "La Mondo", redaktata de Henri Barbusse, aperigis la artikolon "Pri Tolstoj". Laŭ peto de Hujucz, Bakin tradukis la

artikolon en la ĉinan lingvon kaj publikigis ĝin en "Orienta Revuo", titolitan "Trocki pri Tolstoj". Dank' al helpo de Hujucz, Bakin sukcesis publikigi en Ĉinio sian unuan tradukon kaj iujn verkojn faritajn en Francio. Pro tio Bakin rigardis Hujucz kiel unu el la plej fruaj redaktantoj de siaj verkoj. Post la forpaso de Hujucz Bakin skribis kun profunda sopiro:

"En la pasintaj jaroj mi malofte kontaktiĝis kun li. Sed ni ofte renkontiĝis, antaŭ ol mi falis en malsanon. Lia fervoro por Esperanto kaj lia kontribuo al la disvolviĝo de la ĉina E-movado hontigis min. Ne estas bedaŭro por li, ke li forlasis tiun ĉi mondon en la aĝo de 90 jaroj. Kvankam mi perdis instruiston kaj amikon, kiu prizorgis min dum longa tempo, tamen lia figuro ĉiam staros antaŭ mi kaj lia voĉo ĉiam aŭdiĝos ĉe miaj oreloj. Multe faru, anstataŭ ĉasi famon kaj profiton; solide laboru, anstataŭ senenhavaj paroli. La vortoj lumigis mian vivovoĝon."

*Multe faru, anstataŭ ĉasi famon kaj profiton;
Solide laboru, anstataŭ senenhavaj paroli.*

Bakin kaj Hujucz sekvis tiujn vortojn dum sia tuta vivo. ■

S-ro Bakin





S-ro Bakin (maldekstre) kaj japana s-ano Tokuda Rokuro (la dua de dekstre)



S-ro Bakin (la dua de maldekstre) en la fondkunveno de "Amikoj de Esperanto" en Pekino



S-ro Bakin salutas la 65-an UK.

S-ro Bakin (dekstre)
kun ĉinaj esperantis-
toj



S-ro Bakin (dekstre) kaj raportisto de EPC (maldekstre)



Naturdotita energia bazo

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de LIU SIGONG

EN la regiono ĉirkaŭ Bohai-marŝo la komplika geologia strukturo kaj kompleta stratomo estigis minajn riĉfontojn kun granda rezervokvanto. Statistiko diras, ke tie la rezervokvantoj de karbo, fero, nafto, salo, natura gaso kaj kalkŝtono konsistigas respektive 40%, 44%, 37%, 50%, 23% kaj 16% de tiuj en Ĉinio, kaj ankaŭ tiuj de molibdeno, plumbo, zinko, mangano kaj oro okupas gravan lokon en Ĉinio.

Kompreneble, energio ampleksas ne nur mineralojn, sed ankaŭ nafton, naturan gason, hidroenergion, tervarmenergion, ventopovon, marenergion, sunenergion kaj elektron. Tamen ĉiuj tiuj energi-specoj havas evidentan superecon en la nomita regiono.

EN KARBA MARO

La jara produktokvanto de karbo de Ĉinio jam superis miliardon da tunoj, 1/4 el kiuj produktiĝas en Shanxi-provinco. Pro tio la provinco havas multajn belajn nomojn: provinco de karbo, konservejo de energio kaj mil-mejla karbo-marŝo.

Mi vizitis Shanxi antaŭ kelkaj jaroj kaj trovis, ke tie estas ne nur Antaibu-karbominejo, la plej granda subĉiel-karbominejo de Ĉinio, sed ankaŭ multaj aliaj karbominejoj. En Datong maljuna ministro konigis al mi, ke en la lastaj 40 jaroj ili produktis pli ol 600 milionojn da tunoj da bonkvalita karbo kun malmultaj sulfuro kaj kalko, malmulta malpuraĵo kaj granda varmokvanto.

Shanxi estas abunda je bonkvalita karbo. Komence de la 80-aj jaroj la ĉina registaro faris strategian decidon konstrui energian bazon en Shanxi. De tiam karba industrio de Shanxi eniris novan etapon de disvolviĝo. La ŝtato investis miliardon da juanoj por konstrui kaj pligrandigi 6 modernajn karbo-entreprenojn inkl. de Pingshuo, Gujiao kaj Datong, ĉiu kun jara produktokvanto de dek milionoj da tunoj da karbo. En 1993 Shanxi produktis proksimume 300 milionojn da tunoj da karbo, trioble de ĝia karba produktokvanto en 1978, el kiuj 2/3 transportiĝis aliloken, kaj kiuj konsistigis 80% de la totala karbokvanto aliloken transportita de Ĉinio. Nun Shanxi-provinco estas unu el la altproduktaj regionoj de karbo de la mondo. Por fundamenti la estontan disvolviĝon de la karba industrio, nun la provinco konstruas 24 parojn da grandaj ŝaktoj kaj rekonstruas 800 parojn da lokaj ŝaktoj. Post finkonstruiĝo de tiuj ŝaktoj la produktopovo de karbo pliiĝos je 100 milionoj da tunoj.


Dank' al reformado kaj pordmalfermo karba supereco de Shanxi-provinco atingis plenan disvolviĝon. Oni diris, ke la ĉina industrio malrapidigis sian disvolviĝon almenaŭ je 20%, se ne estus grandskala disvolviĝo de karbo de Shanxi. Nun ni ne diskutu pri sciencoco de la diro, tamen ĝi almenaŭ atestas, ke estas neneglekta la rolo de la karbo de Shanxi en la ĉina ekonomia disvolviĝo.

Samkiel Shanxi-provinco, ankaŭ la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio abundas je karbo.

Koncernaj fakuloj diris, ke la totala valoro de la rezervitaj minaj riĉaĵoj de la Interna Mongolio estas 13 000 miliardoj da juanoj, i.a. ĝia konfirmata karba rezervokvanto estas 217.4 miliardoj da tunoj. Fakuloj atentigis, ke la naturdotita minaja supereco de la regiono karakteriziĝas ankaŭ per ĝiaj plej multaj specoj kaj bona kvalito, i.a. la rezervokvanto de rara tero, alinome vitamino de industrio kaj agrikulturo, konsistigas 79% de tiu de la tuta mondo.

Shanxi kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio ambaŭ estas landinternaj provincoj. Por sia pordmalfermo ili prenas intiman kunlaboron kun la provincoj

Skema mapo de lokoj de la regiono



kaj municipoj ĉe Bohai-marĉo kiel la unuan paŝon kaj rektan kontakton kun aliaj landoj plene profitante de siaj abundaj riĉfontoj kiel la duan kaj trian paŝojn.

KARBA KAJ ELEKTRA INDUSTRIOJ EN KUNA DISVOLVIĜO

Ekde la mezo de la 80-aj jaroj, pli kaj pli akriĝis la kontraŭdiro inter livero kaj postulo de elektro en Ĉinio, kio grave malhelpis pluan disvolviĝon de la nacia ekonomio. Sekve, la ĉina registaro decidis uzi kapitalojn fremdan kaj kolektitan de diversaj lokoj en disvolvo de la elektra industrio.

En Shanxi-provinco mi informiĝis, ke samtempe kun grandskala konstruado de karbo-minejoj, la provinco penadas por transformi karbon en elektron. En la pasintaj 15 jaroj tie oni konstruis 56 elektrejojn kun totala generatora kapacito de 8.475 milionoj da kilovattoj kaj jara elektra produktokvanto de 41.75 miliardoj da kWh. La pokapaj generatora kapacito kaj produktokvanto de elektro okupas la unuajn lokojn en Ĉinio. Samtempe, Shanxi-provinco jam transmisiis al Pekino, Tianjin, Hebei-provinco k.a. 62.1 miliardojn da kWh da elektro, kiuj egalas al 41.6 milionoj da tunoj da karbo. Ĝi estas la provinco, kiu transmicias aliloken plej multe da elektro en Ĉinio. Nun, 1/4 de la elektro de Pekino estas el Shanxi-provinco.

Stariĝis elektrejo unu post alia sur la bela ŝtupo de la Interna Mongolio.

De 1995 la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio transmicias al Pekino ĉiujare 1.5 milionojn da kWh da elektro. Fine de la 20-a jarcento en la regiono la totala generatora kapacito atingos 21 369 000 kW, ĝi transmicias aliloken 11.5 milionojn da kWh da elektro ĉiujare. Jen kial oni nomas la regionon "suno" pendanta super norda Ĉinio.

Samtempe kun tio, la Huaneng-a Internacia Elektro-ekspluata Kompanio, intime kunlaborante kun la registaroj de koncernaj provincoj kaj municipoj, faris konsultiĝon pri prezoj kaj adjudikadon al dekelkaj internacie famaj fabrikantoj, kaj subskribis sinsekve 13 kontraktojn pri importado de kompletaj ekipaĵoj de grandaj elektrejoj kun fabrikantoj de Japanio, Usono, Kanado, Italio, Francio, Britio, Germanio, Svisio kaj Rusio. Ĝis nun, jam ekfunkciis 11 elektrejoj inkl. de Dalian-a Huaneng-Elektrejo kun totala generatora kapacito de 6.1 milionoj da kW.

En Dalian mi vizitis la menciitan elektrejon ĉe Dalian-haveno. Enirinte la elektrejon, oni kvazaŭ vizitis belan ĝardenon. S-ino Zhang de la elektrejo akompanis min en la vizito. Ŝi klarigis, ke la elektrejo kovras areon de 42.5 hektaroj, kun generatora kapacito de 1.4 milionoj da kW. La elektrejo estas konstruata en du periodoj. En la unua periodo oni instalas du 350 000-kilovattajn generatorarojn, importitajn el Japanio. La dua periodo estas en adjudika etapo.

La elektrejo prenas japanan Matsugashima-elektrejon kiel sian modelon. Nun, administrado de la elektrejo jam atingis la ŝtatan nivelon. Neniu el la pli ol 700 poluaj punktoj de la tuta elektrejo tralikiĝas, kion laŭdis ankaŭ alilandaj fakuloj.

EKSPLUATADO DE OLEKAMPOJ

La Delto de la Flava Rivero kun areo de 5 200 kvadrataj kilometroj en la centro de la ekonomia distrikto ĉirkaŭ Bohai-marĉo, situante ĉe enmariĝo de la Flava Rivero, abundas je petrolo, natura gaso, salamoniako, vegetaĵoj kaj sablo. Dank' al tiuj riĉfontoj ĝi estas unu el la plej riĉaj lokoj en la baseno de la Flava Rivero.

En Shandong-provinco, kiu sin trovas en la delto, mi vidis multajn fragmitojn sur blanka alkala tero. Tie estas multaj ŝaktoskafaldoj kaj pumpiloj de la olekampo Shengli. Ili bonorde lokiĝas sur la kampoj, ĉe la ŝoseo, antaŭ kaj post domoj. Shengli-olekampo estis ekspluatita en 1964. Dum pli ol 30 jaroj tiu alkala marĉejo, dorminta multajn jarojn, produktis pli ol 273 milionojn da tunoj da nafto.


En januaro 1964 oni komencis konstrui Dagang-olekampon, je 50 km sudoriente de Tianjin. Nun ĝi produktas ĉiujare 4.2 milionojn da tunoj da nafto kaj 360 milionojn da kubmetroj da natura gaso. Ĝi, kiel la olekampo Shengli, Huabei (en Hebei-provinco) kaj Liaohu (en Liaoning-provinco), kiuj situas en la regiono ĉirkaŭ Bohai-marĉo, estas sinteza energia bazo, kie plene disvolviĝas plurspecaj ekonomioj, kiaj produktado de gaso, prilaborado de nafto, maŝinfabrikado, scienca esplorado kaj projektado.

La vizito de la olekampo Chengbei sub la Bohai-a Petrola Kompanio tre ĝojigis min. Estis bela tago. Ŝipestro diris, ke ni estas feliĉaj, ĉar antaŭ tiu tago tie pluvetis.

Ni ŝipveturis ĉ. 4 horojn kaj vidis platformojn de Chengbei-olekampo. Inter la platformoj sur Bohai-marĉo tiuj de Chengbei-olekampo ne estas la plej grandaj, nek plej modernaj. Tamen, kiam mi suriris ĝin, mi sentis mirindecon de moderna industrio. En la olekampo kuŝas du platformoj en la distanco je 1 km inter si. Ĉio sur la platformoj estas oranĝkolora escepte de dekelkaj blankaj cisterno. Laboristo Xiao Li ripete atentigis, ke ni nepre surmetu laborveston. Laŭ li sekureco sur la platformo estas la plej grava.

Sur la platformoj estas produktejo kaj loĝejo. Ĉeloka komandanto s-ro Xue Chengyuan konigis, ke tie la produktado estas regata de la ĉefregadejo kaj sur la laborejoj preskaŭ ne vidiĝas laboristoj. Xiao Li, montrante 24 starantajn dikajn tubojn, diris al mi, ke tra ili oleo fluas en cisternojn kaj poste transportiĝas aliloken.

La ĉina mara petrola industrio naskiĝis en la 60-aj jaroj. En 1980 Ĉinio komencis kunlabori kun iuj eksterlandaj petrolaj kompanioj, sekve ekspluatado kaj konstruado de olekampo ricevis pli rapidan disvolviĝon. En la pasintaj 10 jaroj la Bohai-a Petrola Kompanio, dank' al kuna investado kaj kunlaboro kun Japanio, Francio, Usono kaj Britio, faris grandskalan prospektadon pri petrola strukturo de Bohai-marĉo kaj konstruis sinsekve modernajn surmarajn olekampojn Chengbei, Bozhong 28-1 kaj Bozhong 34-2/4E3. Nun funkcias sume 7 olekampo kun jara produktokvanto de miliono da tunoj da nafto. ■




Parto de la elektrejo Huaneng en Dalian




Karbokonservejo

Sur Dagang-olekampo

Foto de **LUO XING**




REGIONO ĈIRKAŬ BOHAI-MARO



Platformo sur olekampo de Bohai-mar




La Dalian-a
Petrol-rafinejo



BING CHUAN:

La lasta amo



Direktoro de la hospitalo kaj paciento

“**F**ELIĈAN naskiĝtagon!” Eksonis gaja melodio. Sur granda kuko brulis 82 ruĝaj kandeloj. 82-jara maljunulo ĝoje kaj kontente larmis, rigardante la ĉirkaŭstarantojn, kiuj kun rideto deziris al li longan vivon. Tio okazis ne en la hejmo, sed en la unua ĉina privata hospico por gravaj malsanuloj en Pekino.

Pro malsanoj, iuj maljunuloj ne kapablas flegi sin mem en ĉiutaga vivo kaj plie mankas al ili familianoj, kiuj povas flegi ilin, kaj plie ili ne povas enhospitaliĝi. Tio jam fariĝis neignorebla socia problemo. Oni faris enketon al iuj maljunuloj: “Pri kio vi plej maltrankvilas?” La respondo ne tuŝis prezaltiĝon, nek socian sekurecon nek aliajn, sed la estontecon, kiam ili ne kapablos flegi sin mem en ĉiutaga vivo. Tio ja estas vere neevitebla problemo.

La homoj progresas kaj la socio evoluas. Nun “hospicologio por maljunuloj” kiel koneksa scienco prosperas. Ĝi rilatas al psikologio, sociologio, medicino, flegologio, etiko k.a. En 1967 brita d-ro

Sanders iniciatis Hospicon S. Christopher. Ekde tiam la afero estas multe atentata de la internacia publiko.

Ĉinio komencis hospican esploradojn antaŭ kelkaj jaroj. En 1988 en Ŝanhajo fondiĝis “Flegejo por emeritoj” kaj en Tianjin stariĝis “Centro de hospica esplorado”. Komence de 1992 hospica malsanulejo de la Pekina Songtang-hospitalo ekakceptis pacientojn.

Doni al maljunuloj pli da zorgo, por ke ili forlasu la mondon kun kiel eble plej malmulte da bedaŭro. Tio estas celo de la hospico. Mi vizitis la Pekinan Songtang-hospitalon, kie oni rakontis al mi multajn kortuŝajn ferojn de kuracistoj kaj flegistinoj.

Estis iu bela kaj eleganta malsanulino, kantema kaj dancema. Ŝi amis sian karieron, siajn edzon kaj filinon. Tamen ŝi jam venis al la fino de la vivo, tuj ĉe sia mezaĝiĝo.

Sur ŝia kuraca registro klare legiĝas: utera kancero.

Kiam ŝi kun espero je la vivo kaj profunda sopiro al la homa vivo ekkuŝis en la Pekina Songtang-hospitalo, la kanceraj ĉeloj jam disvastiĝis en ŝia tuta kor-

po, sur ŝia bela vizaĝo vidiĝis signo de grava malsano.

Ŝi perdis esperon pri la vivo. Ŝi sentadis maltrankvilon kaj teruron.

Ŝi rifuzis manĝi, trinki kaj paroli. Ŝi de tempo al tempo rigardadis en speguleto sian vizaĝon kun blankaj pansaĵoj kaj poste zorgeme ŝmiris sian vizaĝon per belecokremo.

Kuracistoj tion vidis. Kiam ili pansis por ŝi, ili intence uzis pli grandan gazon por laŭeble plene pansi la de kanceraj ĉeloj disvastiĝintan parton de ŝia vizaĝo.

Direktoro de la hospitalo informiĝis de ŝia edzo, ke ŝi estas lerta en fasonado kaj kantado.

Jen oni aranĝis por ŝi specialan koncerton.

En buntaj lumoj kaj akompanate de bela muziko, ŝi en belaj vestoj faritaj de ŝi mem kantadis kaj dancadis per facilaj paŝoj sur la scenejo, kvazaŭ ŝi revenus al sia flora aĝo. Tio donis grandegan konsolon kaj kontenton al ŝi en la animo.

Ŝi kviete adiaŭis la mondon post 96 horoj.



Oni faris al ŝi banon, beligon kaj kombadon. Ŝia edzo proprakule vidis ĉion ĉi. Kun larmoj en la okuloj li, premante la manojn de la direktoro de la hospitalo, diris: "Mi dankas vin, ke ŝi forpasis en belo."

Mi intervjuis 74-jaran prof. Zhang Guohua de la Jura Fakultato de la Pekina Universitato, kiu enhospitaliĝis antaŭ nelonge. Pro grava hemoragio kaj kora kaj rena kolapso li komatis jam ĉe la enhospitaliĝo. Laŭ diagnozo la resaniĝa ebleco por li estis malgranda, tamen la hospitalo savis lin plentforte. Pasis dekelkaj tagoj kaj lia malsano mildiĝis, li rekonsciigis kaj jam povis babilu kun la vizitantoj.

Dank' al la atentema kuracado kaj zorgema flegado de la kuracistoj kaj flegistinoj 7% el la pacientoj de Songtang-hospitalo resaniĝis kaj elhospitaliĝis.

Ĝenerale dirite, malsanaj maljunuloj, longe kuŝantaj en lito kaj turmentataj de soleco, estas strangaj, solecaj, apatiaj kaj malpaciencaj. Tamen ili soifas tenerecon. Rememorante pri la okazintaĵoj en la socio, ili profunde emociiĝas. Ĉia ajn bagatelo povas ĝojigi aŭ mal-

trankviligi ilin. Tamen malmultaj volas aŭskulti ilian voĉon. Ili povas nur silentigi la vortojn en la koro. Sur la pordo de Songtang-hospitalo okulfrape legiĝas: "Kiam vi sentas solecon, voku psikologon de la hospitalo. Niaj laborantoj povas babilu kun vi, legi por vi libron kaj gazeton en ajna tempo." Ofte la laborantoj de la hospitalo, sidante ĉe lito, aŭskultis rakonton de maljunuloj, kiuj babilas pri ĉio, inkl. de la kariero kaj hejmaj bagateloj. La laborantoj dividas kun ili kaj ĝojon kaj malĝojon kaj ĉiam donas al ili konsolon ĉe ilia malĝojo. En babilado la maljunaj pacientoj fariĝas iom post iom trankvilaj kaj ilia malsano mildiĝas.

En la vizito mi rimarkis, ke la hospitalo dependas sole de kuracpago kaj malmulte da socia monhelpo, tial ĝiaj kuracaj instalaĵoj estas malbonetaj kaj multaj problemoj atendas solvon. Ekz. en ne-granda ĉambro loĝas 2-3 malsanuloj kaj unu flegisto aŭ flegistino. La spaco por malsanula aktivado estas malvasta, kuracaj ekipaĵoj nesufiĉaj, en oficejo laboras kaj kuracistoj kaj flegistinoj. Kaj la fridujoj, videoaparatoj kaj ŝrankoj en la hospitalo estas pruntitaj de la laborantoj.

Malgraŭ la financa malfacilo, la hospitalo decidis doni specialan zorgon al instruistoj, kiuj laboris pli ol 30 jarojn, kaj specialistoj, kiuj faris gravan sciencan kaj teknikan kontribuon, kaj ne postuli de ili la pagon por lito.

Nun hospicaj aferoj estas multe atentataj de diversaj sociaj rondoj en Ĉinio. La membroj de la Ruĝa Kruco de Pekinaj Altlernejoj faris volontulan servon al maljunuloj en ferioj kaj festotagoj, multaj mezlernejoj donacis al maljunuloj memoraĵojn zorgeme faritajn de ili mem kaj prezentis programerojn por ili.

Tie morto ne plu estas tragedia kaj terura. La maljunuloj tie forpasis kunportante la lastan amon de la hospico. ■

KORESPONDI DEZIRAS

*S-ro Su Baisen, direktoro de iu scienc-teknika komerca kompanio dez. kunlabori kun diverslandaj geesperantistoj. Respondo garantiata. Adr.: Kangle-Lu, 13-1-7 Hao, CN-233000 Bengbu, Anhui, Ĉinio.

*Mi dez. kor. kun ĉiulandaj e-istoj. Mi kolektas monerojn kaj bankbiletojn. Adr.: Jan Skiba, Poste Restante, 44-217 Rybnik-17, Pollando.

*Anoj de la Esoterista Esp-Grupo, studenta teorion de Gual Khula, dez. kor. kun s-anoj tm. Ĉiu skribinto ricevos respondon. Adr.: Esoterista Esperanto-Grupo, ab. jaŝ. 264, 354000 Soĉi-54, Rusio.

*31-jara e-istino dez. kor. pri turismo kaj krei E-familion tm. Adr.: Fashide Amir, Shuwaikh Comm, Dept. P.O. 126, Safat, 13002, Kuwait.

*Junaj komencantoj dez. kor. tm. Jen adresoj:

Irina A. Pavlova (15j.), Naberejnye Ĉelny, Novi gorod, RUS-423837, 54/15-52, Tatario, Rusio.

Olga A. Gutnikova (15j.), Naberejnye Ĉelny, Novi gorod, RUS-423837, 2/17-280, Tatario, Rusio.

Lilia A. Ŝaripova (15j.), Naberejnye Ĉelny, Novi gorod, RUS-423827, 27/14-499, Tatario, Rusio.

*Zaozhuang-a Publik-rilato-Asocio dez. kor. kun similaj organizoj kaj s-anoj. Adr.: S-ro Sun Mingxiao, Wenhua-Lu 81-hao, Zaozhuang, Shandong, Ĉinio.

*Por kuraĝigi 6-jarajn infanojn lerni Esperanton, bv. sendi pk. el la tm. kun salutoj al la infanoj: János, Livia, Nóra kaj Nóri. La pk. taŭgos por planata ekspozicio en la lernejo kaj por uzo en geografia leciono pri urboj de la mondo. Dankkarton ricevos ĉiuj. Adr.: Talento-Lernejo, PF. 102, H-2041 Budaörs, Hungario.

*Mi volas vendi kaj iomete korespondi por finlingva 36-aŭtora senlaborea poemaro "Pentti Törmälä: Irtisanottajen Istunto". Aparte mi esperas kontaktojn kun finlingvaj personoj loĝantaj ekster Finnlando, same finlingvaj gazetoj. Skribu Esperante aŭ finne: Pentti Tormala, Domargard, FIN-06100 Porvoo, Finnlando.

*Minska junulara klubo "Verda Lumo" dez. kor. kun junularaj kluboj el diversaj landoj. Bv. skribi al la prezidantino; Alla Fridman, str. Kediŝko, 21a-10, 220023, Minsk, Belorusio.

*Pedagogoj, negoculoj, gimnazianoj, pensiuloj de Nordhungara Esperanto-Societo dez. kor. kun aliaj grupoj kaj personoj. Adr.: Gustavo Lukacs, Jocika ut 3, 10/2, 3524 Miskolc, Hungario.

*Mi serĉas malnovajn akciojn kaj obligaciojn el la tuta mondo, prefere kun bildmotivoj. Ankaŭ interŝanĝo eblas. Bv. kontakti Michael Zilvar, Grubenhagenstr. 8, D-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Fakso-numero: +49-5521-72900.



Brava lazanto

ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ

Sur stepo de la Interna Mongolio

Fotoj de LIU SIGONG

Gaja renkontiĝo




Transloĝiĝo



Parolante pri la stepoj de la Interna Mongolio, oni nature ligas ilin kun la lazura ĉielo, blankaj nuboj, gregoj, jurtoj... Sed kiam mi vizitis la plej nordan parton de la Interna Mongolio, mi trovis, ke ili estas nur parto de stepo.

Min plej interesis renkontiĝo antaŭ jurto. Sur stepo jurtoj distancas unu de alia ofte kelke aŭ dekojn da kilometroj. Sed ĉiutage la paŝtistoj venas de diversaj lokoj por kolektiĝi. Oni diris al mi, ke kelkfoje venas dekoj da paŝtistoj junaj kaj maljunaj. Ili interparolas pri milito ie en la mondo, pri bonrasa ŝafo el alia lando, pri ies nova motorciklo aŭ pri ies nove aĉetitaj brutoj. Ĉiam en kontentiĝo ili adiaŭas unu alian. Junulo el ili diris al mi: "Ĉi tie estas nia informejo." Jes, sur la senlima stepo tia renkontiĝo ebligas facilan komunikadon de novaĵoj.

La grasaj brutoj, la honestaj paŝtistoj, la belaj pejzaĝoj de la stepo forte allogis min, kiu longe loĝas en granda urbo. Kiam la subiranta suno orumis la stepon, ĉiu jurto ekhavis super si fumkolonon, kaj leviĝis bela melodio de kordmuzikilo kaj laŭta kantado de paŝtistoj.



En jurto

Survoje al la patrina hejmo



Amo en tempo de ftizo

de GEORGO KAMAĈO
(Hispanio)

Frosta nokto (1947). Bakin (1904). El la ĉina trad. Laŭlum. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1990. 302p. 22cm. Bind. Ilus. 14.40 gld.

La familio de Pascual Duarte de la Nobel-premiita Camilo José Cela kaj *Frosta nokto* de Bakin, daŭra Nobel-kandidato, verkiĝis ambaŭ post milito. Ili prezentas sinsekvon de malfeliĉo post malfeliĉo, ĉene. Sed, dum Cela "spegulas la brutalon, la mizeron, la violentan temperamenton de homoj" (F. de Diego), Bakin pentras tute alian *homklimaton*, laŭtitole frostan kaj noktan. Kiel sciigas la tro eksplicita kovrila prezento, temas pri la familia vivo de mizera oficisto, Wang Wenxuan, kiu malsaniĝas je ftizo. De la komenco ni legas romanon pri kunvivanta eksparo, Wenxuan (aŭ simple Xuan) kaj Shusheng, 34-jaraj. Oficiale ili estas ne geedzoj, sed gekonkuboj, malgraŭ 14 jaroj da kuneco. Krome loĝas kun ili la patrino de Xuan, sennoma kaj postulema.

Oni trovos en la verko nenian politikan aŭ reĝiman propagandon. Anstataŭe elstaras du problemaĵoj: la rilatoj inter viroj kaj virinoj, kaj la rolo de virinoj en la socio kaj en la familio. La ftiziĝo de Xuan pliakrigas rivalacon inter lia patrino kaj la *edzino*, tiom kaj fine li devus elekti. Sed, kiel legeblas sur p. 169:

Li havas nek rimedon por interamikigi la patrino kaj la edzino, nek fortan volon elekti unu el ili.


Ni vidu ekzemplon el p. 99: *La edzino kredis je okcident-medicina kuracisto, kaj proponis alvenigi la medicinan konsilanton de la banko Dachuan, sed la patrino insistis venigi ĉinmedicinan kuraciston.* Simile okazas pri tre diversaj aferoj: la nova kaj la malnova Ĉinujoj tigre batalas. Maleblas do redukti la rilaton inter la patrino kaj Shusheng al nura generacia konflikto. Apartaj mondoj, apartaj mensoj antagonismas.

En la paro ne nur li, sed ankaŭ ŝi ĉefrolas. Xuan estas hezitema, ne matura, kompatinda bonkorulo, kiun neniu atentis. Ĉiam li intencas fari ion, tamen ĝin neniam faras. Male, Shusheng volas liberon. Ŝi sentas plenkorpe, ke la vivo estas senŝenca, dum li havas nenian firman opinion. Kaj ŝi ne volas forvelki, konsumiĝi tiel. En ŝia cerbo kunestas kontraŭdiraj pensoj; ankaŭ ŝi estas nedecidema, sed ŝi aktivigas kaj agas, dum li nur pasivas, trompante sin kaj aliajn.

Legante mi trovis la verkon surprize atentokapta; ĉirkaŭ p. 150, ĝi iĝas iom lanta kaj ripeta, kio tamen kontribuas al realisma priskribo de la malsano, de la

patrin-edzinaj kvereloj, kaj de la milita tempo en urbo regata de Kuomintang; kune kun la insista ripetado okazas subtila evoluo de situacioj kaj sintenoj, ĝis p. 217, kie la romano senteble revigliĝas. *Frosta nokto* estas, resume, rakonto de agonio: agonio korpa, mensa, familia.

Mi varme rekomendas ĉi tradukon fare de Laŭlum, kiu regalas la leganton per modela, imitinda stilo, klara, flua kaj eleganta (malkiel tiu de la Analiza Skolo). Agrable surprizis min la abundaj eksneologismoj, t.e. vortoj kiuj jam de longe sidas en la beletra prozo, kaj kiuj iom post iom penetras ankaŭ la komunuzan lingvon: ekz. *diskordo, fetoro, haladzo, -iva, kafeterio, lanugo, preventi, sparko, stando, termoso* (po 1-foje, se mi ne miskalkulis); *damaĝi, oponi* (po 2-foje); *poka, tenebro* (3); *magra* (4); *debila, povra* (5); *lante, morna, softa* (8); *morozita, trista* (9); *tenera* (12); *langvoro* (13); *ascendi* (15); *aperti* (tr.) (17); *febla* (18); *descendi* (20); kaj *haste* (58! — paradokse, ĉar neniu el la roluloj hastas ien ajn). Tre aplaŭdindas la daŭra alterno de mal- kaj malmal-vortoj. Per riĉa vortprovizo Laŭlum, traduka majstro, talente rekreas la romanon en Esperanto samtempe klasika kaj moderna. ■





Skulptado

BELECO DE ĈINIO

En urbeto de jadaj skulpta- ĵoj

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de LIU CHEN

SAME kiel domoj de la vilaĝoj ambaŭflanke de la Flava Rivero, tiuj de la urbeto Shifosi estas leŭsaj. Sed antaŭ la domoj de la urbe-
to amasiĝas ŝtonoj grandaj kaj malgrandaj.

“Tio estas jado el Dushan-monto,” klari-
gis loĝanto kun plezuro al scivolemaj alilokanoj. Montrante al monto en nordo, li diris: “Jen Dushan-
monto.” Li surpriziĝis, ke ili ne rekonas en ili jaden.
“Ho, ĉu vi ne aŭdis pri Dushan-jado? En nia lan-
do famas Hetian-jado de Xinjiang, Lantian-jado de
Shaanxi, Xiu-jado de Liaoning kaj Dushan-jado de
Henan.”

En la urbeto etendiĝas antikva strato kun jadaĵ-
butikoj. Tie komercas ne nur lokanoj, sed ankaŭ
alilokanoj. Iuj el la lastaj diris, ke ili povas multe
profiti el jadaĵ-komercado en la urbeto. Pro tio ili
translokiĝis en la urbeton kaj ekfunkciigis butikon
de jadaĵoj. Antaŭ 500 jaroj tieaj jadaĵoj servis
kiel tributo por la kortego. Kaj en Qing-dinastio
(1644-1911) tie kolektiĝis multaj komercistoj.

Prosperis komercado en la strato de mateno ĝis
vespero. Tie vendiĝis jadaĵ braceletoj, kolĉenoj, kru-
ĉoj, glasoj kaj incensujoj. Alilokanoj hastis de unu
butiko al alia, demandis pri prezo kaj marĉandis.
Fakte, por ili tute ne necesis hastemo, ĉar la urbanoj
garantiis manĝon kaj loĝon al alilokaj klientoj, ne
postulante la pagon. Lokaj maljunuloj pasumis sur-
strate kaj parolis kun siaj najbaroj pri pasintaĵo.
Iafoje ili vizitis butikojn de alilokanoj por informiĝi
pri la ekstera mondo.

De la antikveco ĉinoj ŝatas jadaĵon. La antikvuloj
opiniis, ke jado estas kvintesenco de la universo. Ĝi
estas eleganta kaj senmakula. Pro tio oni komparis
ĝin kun virto, kultis la ĉielon kaj teron kaj sin
ornamis per objekto farita el ĝi. Gravedulino portis
sur si belan jadaĵon kiel edukilon por la feto, opi-
nante, ke ŝia bebo estos virta. Kiam iu mortis, liaj
familianoj enmetis en lian buŝon jadan cikadon,
dezirante, ke li reviviĝu kiel senkrustiĝinta cikado.
La antikvuloj konfidis sian vivon kaj morton al jado.

Nuntempe la urbanoj ornamas siajn infanojn per
jada kolĉeno kun ruĝa silka ŝnureto, dezirante al ili
longan vivon. Ankaŭ la nomo de iuj infanoj enhavas
ĉinan ideogramon signifantan jaden.

Wang Baolu estas tre sperta en komercado. Lia
metiejo estas lokita en la dua etaĝo de la butiko. En
ĝi funkcias 15 maŝinoj. Krom liaj familianoj, tie
laboras ankaŭ 25 dungitoj. Antaŭ nelonge li skulptis
birdojn kaj florojn el jado kun akvo ene kaj donis al
la artaĵo la nomon “Akva Veziko”.

En la urbeto estas mondo de juveloj kaj jadaĵ
skulptaĵoj. Tie kolektiĝas vivoveraj verkoj de dekmi-
loj da metiistoj. Aglo sur roko, kokido intencanta
beki vinberojn, lokusto sur folio de brasiko k.a. estas
kreitaj de urbanoj laŭ la natura koloro de jado.

La vinujo en formo de bovo plaĉis al alilanda
turisto, kiu aĉetis la specimenon kaj faris mendon.
La bovo portas surdorse drakon, kiu servas kiel
kovrilo de la vinujo. La bova kapo kaj la draka vosto
estas interligitaj per jada ĉeno el pli ol 40 eroj. La
jadaĵo estas farita el sola jada peco.

Inter la jadaĵ skulptaĵoj estas “Leono kun Globe-
toj”. Sur unu jada peco la aŭtoro skulptis leonon
kaj dekelkajn globetojn diversgrandajn, ruliĝan-
tajn unu en alia.


En malluksa hotelo de Pekino tutjare loĝas
Shifosi-anoj. Inter ili estas pli-ol-50-jara virino no-
mata Shang. Ŝi diris, ke ŝiaj edzo, frato kaj filo faras
jadaĵojn en sia hejmloko kaj ŝi okupiĝas ekskluzive
pri vendado de jadaĵoj. Iliaj jadaĵoj vendiĝas en la
Ĉiela Altaro, Beihai-parko, Dek Tri Maŭzoleoj de
Ming-dinastio, Somera Palaco kaj aliaj vidindejoj de




"Smeralda Bodisatvo"

Pekino. Ŝi diris ankaŭ, ke por akiri diversajn materialojn ŝiaj samlokanoj aĉetis ne nur Hetian-jadon, Xiu-jadon kaj Yunnan-malakiton, sed ankaŭ smeraldon de Birmo kaj jaspon de Kanado. Kaj la metiistoj de la urbeto kreas artaĵojn ne sole el Dushan-jado.


Ĉie kaj ĉiam ili tenas en sia memoro la 1 000-jaran templon Shifosi. Ili diris, ke en ĝi estas kultata granda budhostatuo skulptita el Dushan-jado. Sur ilia vizitkarto estas presita la adreso de Shifosi-urbeto. Sed ili ne rekonis, ke ili estas jadaĵ-metiistoj. Ili diris: "Ni estas kamparanoj. En rikolta sezono ni reiros hejmen por fari kamplaborojn." ■





"Ok Feoj Festantaj Naskiĝtagon"



"Birdoj kaj Peonio"



"Budho kun Akvaj Vezikoj"



"Smeralda Lufo"

EKONOMIO

● En 1993 Ĉinio enkondukis eksterlandan investaĵon de 26 miliardoj da usonaj dolaroj, je 134% pli multe ol tiu en 1992, kaj per tio ĝi okupis la unuan lokon en la disvolviĝantaj landoj kaj la duan lokon en la mondo, nur post Usono, kiu enkondukis investaĵon de 32 miliardoj da usonaj dolaroj.

● La industriaj entreprenoj de Wuxi-gubernio, Jiangsu-provinco, alprenis serion da efikaj rimedoj.

Iuj entreprenoj komencis pligrandigi muntan povon per malgranda sumo da kapitalo anstataŭ pligrandigi produktivon per granda sumo da kapitalo. Ekz., la maŝinofabro Fanrong (Fanĵong) trovis, ke la aŭtomata komputera maŝino produktanta komputeraĵojn estas importita de longa tempo, kaj petis scienc-esploran fakon projekti kaj fari tian maŝinon. Ĝi utiligis ekipaĵojn de iuj grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj kaj partoprenigis iliajn laboristojn en prilaboro de pecoj de maŝino por mem fari muntadon kaj vendadon. Rezulte, ĝi investis pli ol 200 000 juanojn kaj enspezis 40 milionojn da juanoj en la sama jaro.

En 1993 la produktov valoro de la vilaĝaj entreprenoj de Wuxi-gubernio atingis 43 miliardojn da juanoj.

● La libro "Pri antikvaj inundoj ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero", verkita de ĉinaj hidraŭlikaj fakuloj lastatempe, atestas, ke la projekto de la akvoutiliga konstruo de la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero estas fidinda. La konstruo povos rezisti kontraŭ grandega inundo de Yangzi-rivero, okazonta en 2 500 jaroj.

● La 22-an de novembro 1994 komenciĝis la

konstruado de la Jiangyin(Ĝĵangĵin)-ŝosea pontego super Yangzi-rivero en Jiangsu-provinco, la unua larĝspana ferkabla pendponto de Ĉinio. La ponto longos 2 888 m kun la ĉefa spano de 1 385 m. La norda kaj suda turoj de la ponto altas po 190 m. La planko kun 6 veturejoj larĝos 33.8 m. Sur ili aŭtoj kuros je 100 km/h. Sub la ponto kun pas-alto de 50 m povos trapasi 50 000-tonela ŝipo. La ponto finkonstruiĝos en 5 jaroj.

● Por rapidigi la konstruadon de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj plioftigi kontaktojn inter Tibeto kaj la landinterno, la ĉina registaro decidis konstrui fervojon en Tibeto, la unika senfervoja aŭtonoma regiono de Ĉinio. La fervoja konstruado en Tibeto estas en preparado, kun totala investaĵo de 20 miliardoj da juanoj. Ĝi estos unu el la plej grandiozaj fervoj-konstruoj en Ĉinio kaj eĉ en la mondo.



Subakva aŭtomato

● Ĉina kamparano Su Ximing lastjare kulturis kotonujojn sur kampoj de 12.45 muoj (15 muoj egalas al unu hektaro) ĉe la dezerto Taklimakan, konata kiel “morta maro”, de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. La meznombra mua produktokvanto de sensemigita kotono estis 214.34 kg kaj la monda rekordo, indikita en “Rekordoj de Guinness”, estas 206 kg.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● Subakva roboto, farita de la Shenyang-a Aŭtomata Instituto kaj aliaj organizaĵoj en nordorienta Ĉinio antaŭ nelonge, sukcese subakvigis je 1 000 m en la Suda Ĉina Maro kaj fariĝis pioniro de Ĉinio tiuflanke.

Fakuloj diris, ke la malfacileco en tekniko por fari tian roboton povas kompari sin kun tiu en la spaca tekniko. Nun la nombro de samspecaj robotoj ne superas 30 en la mondo. Subakvaj robotoj estos vaste aplikataj ne nur en ekspluatado de maraj petrolo kaj mineraloj, sed ankaŭ en maraj scienc-esplorado, elakvigo kaj savado.

MEDICINO

● Januare de la lasta jaro d-ro Zheng Wenling de la Kantona Hospitalo de Guangdong prelegis al pli ol cent fakuloj el diversaj landoj pri hipotezo, ke la ĉelo havas la kapablon memori, malkunigi kaj transformi. Li radikale neis la vidpunkton en klasika teorio, ke la ĉela modelo estas kiel ludbloko. Lia prelego vekis grandan ĉhon.

La frukto de Zheng Wenling estas nomata “ĉela lingvistiko”, kiel nova fako. Ĝi preparis vojon por “arte enmeti sciojn”, altigi la kvaliton de la homoj kaj longigi la vivon. D-ro Zheng diris, ke estonte trijara infano, post arta enmetado de scioj, povos atingi la nivelon de studento.

● Ĉinmedicina kuracisto Wang Zanli, absorbiĝinte en kuracado de nekrozo de femuralo, trovis, ke la malsano estas kaŭzita de grandarea angia malsano kaj malglata sangocirkulo estigitaj de prenado de granda kvanto da hormono, ekscesa drinkado kaj grava traŭmato.

Wang Zanli, en kombino de fomentaĵo kaj perbuŝaj medikamentoj, en la pasintaj jaroj resanigis pli ol 2 000 pacientojn, kun kuracefiko sur pli ol 90% de la pacientoj, inter kiuj 60% tute resaniĝis. Koncernaj fakuloj opinias, ke Ĉinio estas avangarda en la mondo tiuflanke.

KULTURO

● Lastatempe Lijiang-eldonejo de Ĉinio eldonis la kompletan version de la sovetia romano “Kiel hardiĝis ŝtalo”. La ĉina versio de la romano havis profundan influon sur la ĉinajn junulojn en la 50-60-aj jaroj. En la romano eldonita de Sovetunio en la 30-aj jaroj la nomoj de historiaj personoj estis forstrekitaj. La ideogramoj de la ĉina versio en la origina fizionomio multiĝis je ĉ. 40 000, kompare kun la ĉinigitaj romano eldonita antaŭe.

● La Fremdlingva Eldonejo sub la Ĉina Fremdlingva Buroo de Eldonado kaj Distributado, kunlabore kun Guangfu-eldonejo de Taiwan, aperigos kaj distribuos ĉi-jare la ĉinlingvan eldonon kun simpligitaj ideogramoj de la mondfama angla “Enciklopedio de Ameriko”. Ĝi estas kompilita kaj reviziita surbaze de la ĉinlingva eldono de Guangfu-eldonejo kun originalaj kompleksaj ideogramoj.

La libro ne nur prosperigos la ĉinan eldonan aferon de enciklopedioj, sed ankaŭ donos vastan influon al larĝigo de la vidkampo, riĉigo de scioj kaj absorbo de scienc-teknikaj fruktoj akiritaj de la homa socio.

● La plej granda budhostatuo de la mondo estos skulptita el sola jadpeco en Anshan de Liaoning-provinco.

La jadpeco estis trovita en profunda monto de la Manĉura Aŭtonoma Gubernio Xiuyan, konata kiel “lando de jado”. Ĝi, 7.95 m alta, 6.88 m larĝa, 4.1 m dika kaj 260.76 tunojn peza, estas triangula kun la supro kiel firsto kaj koloroj bluverda, verda, helverda, nigra, flava kaj ruĝa.

En Anshan oni konstruos templon por la jada budhostatuo.

ARKEOLOGIO

● Ĉinaj arkeologoj eltrovis budhismajn sutrojn el 200 000 ideogramoj gravuritajn antaŭ 1 400 jaroj sur krutaĵoj de 24 lokoj en parto de Taihang-montaro de Shexian-gubernio, Hebei-provinco. La sutroj de Fukoujing estis dense gravuritaj. Iu el la 24 lokoj havas sutrojn el 41 700 ideogramoj, pli multe ol en la aliaj lokoj. Iu fama ĉina arkeologo diris, ke tiuj ŝtongravuritaj sutroj estas la plej fruaj, plej grandiozaj kaj plej multideogramaj inter la konservataj sutroj de Ĉinio. Kiel raraj ŝtongravuraĵoj de Ĉinio, ili estas tre valoraj en la monda budhisma kulturo.



Naciminoritata vilaĝo


En naciaj vilaĝoj de Pekino

Teksto de HU YUN Fotoj de LIU SIGONG

Dancado



Antaŭ Tancheng-templo





Sur scenejo de la vilaĝo de dong-oj

EN Ĉinio vivas multaj naciminoritatoj kaj ne ĉiuj povas klare diri, kie ili loĝas, kiajn kostumojn ili portas kaj kiujn lingvojn ili parolas.

Rigardu, ĉu tiuj junuloj en bluaj turbano kaj mantelo ne estas ji-oj el Daliang-montaro de Si-

chuan? Kial ili kolektiĝas nun sub granda banjano, kia kreskas en neniuj aliaj loko ol en la regiono Xishuangbanna de Yunnan?... Jen venas mjaŭ-aj junuloj el montregiono de Guizhou, ludante muzikilon *luŝeng-o*. Ilin sekvas taj-aj knabinoj en tubjupo, dong-aj junuloj en nigraj vestoj kaj amej-aj knabinoj en ruĝa jupo. Je la momento

sub la banjano kunfandiĝas kanto kaj muziko.

Ĉio supre dirita okazis en la Ĝardeno de Ĉinaj Nacioj antaŭ ne longe konstruita en Pekino. En ĝi komenciĝis la turismo de popolaj moroj por 1995.

Ĉinio havas 56 naciojn. Nun en la ĝardeno estas starigitaj 16 naciaj


"Trinku vinon!"



vilaĝoj. Tie oni povas ne nur rigardi originalajn pejzaĝojn kaj konstruaĵojn en regionoj de ĉinaj naciminoritatoj, sed ankaŭ sperti interesajn popolajn morojn, ĝui diversnaciajn dancojn kaj kantojn kaj gustumi lokajn etmangaĵojn. Pro tio la ĝardeno altiris multajn vizitantojn.

En la ĝardeno oni vidas harmonion de granda familio. Malgranda ŝtona vojo kondukas al la vidindejo de Tibeto sur la monda tegmento. La temploj sur alta monto ore brilas kaj en la komerca strato Bakuo regas aparta kvieteco. La preĝ-radoj flanke de la temploj sentigas majestecon de religio. En la templo Tancheng tri lamaoj absorbiĝis en sutro-recito kaj iu juna lamao klarigis ion al turistoj. La templo estas religia konstruaĵo fama en la tibeta historio. En ĝi estas kultata statuo de militisto-servisto kun duobla korpo kaj 24 manoj, ĉiu kun muzika instrumento. La statuo estas unika en Ĉinio. Legendo diras, ke la militisto estis ekkonita en Tibeto en la 12-a jc.

Najbare al la vidindejo de Tibeto estas vilaĝoj de ĉjang-oj, va-oj, buji-oj, ji-oj kaj hani-oj. Ĉi tiuj plejparte loĝas en sudokcidenta Ĉinio. En la vilaĝoj dislokiĝas loĝdomoj kun tegmento el lazuraj ŝtonaj platoj, ŝtonaj domoj similaj al fuorto kaj altaj bambuaj domoj.



Ponto en la vilaĝo de dong-oj

En la vilaĝoj oni sentas sin kvazaŭ en regionoj de naciminoritatoj en sudokcidenta Ĉinio. La simpla vakstinkturejo, la du-metra ligna tamburo, la ora rizkampo kaj la verda bambuaro ĉiuj elspiras densan etoson de la vivo.


En la alia flanko de la ĝardeno prezentigas la vidindejo de norda Ĉinio. Ĝi konigas, kiel vivas la tieaj koreoj, evenkoj, oroĉun-oj, heĝe-oj kaj daur-oj. Malsame ol la vidindejo de suda Ĉinio, ĝi altiras vizitantojn per krudeco, malkaŝeco kaj idilia vivo. Tie vidiĝas unuetaĝaj loĝdomoj kun lignaj pordoj kaj fenestroj kaj ankaŭ feltaj jurtoj de ĉasistoj. En la vilaĝo de heĝe-oj estas fiŝboatoj kaj fiŝretoj.

En la naciminoritata vilaĝo de Taiwan estas 3 000-jara ruĝa junipero, nomata Dia Arbo de Alishan. Kvankam velkinta antaŭlonge pro fulmofrapo, ĝi ankoraŭ staras majeste.

Subite aŭdiĝis gaja tamburado. La dong-oj festis la novjaran tagon. La loĝantoj de aliaj vilaĝoj venis gratuli ilin kaj dong-aj knabinoj regalis ilin per nektaro. Ĉe la alta tambura turo la dong-oj kultis siajn prapatrojn, prezentis teatraĵon, dancis nacian dancon kaj prenis novjaran manĝon. Ĉi-momente ankaŭ la rigardantoj dronis en ĝojo. Preskaŭ ĉiumonate en la ĝardeno oni celebras festotagon. Tiam la turistoj povas rigardi scenon malofte videblan en aliaj lokoj kaj sentas sin kvazaŭ en la hejmloko de naciminoritatoj.

Sur la vasta placo Manfeilong de taj-oj staras la blanka pagodo Manfeilong. La pagodo estas simbolo de la taj-a vidindejo kaj la placo estas loko, kie okazas granda amuza kunveno. Ĉiun posttagmezon oni prezentis tie naciajn kantojn kaj dancojn. La prezentantaj gejunuloj venis el diversaj lokoj de naciminoritatoj kaj regalis spektantojn per belaj kantoj. Akompanate de iliaj kantoj kaj dancoj, la ĉina turismo eniris en la jaron de popolaj moroj. Oni ekiros de tie por studi la historion de evoluo de la 56 nacioj de Ĉinio. ■

Por komuna foto



Operacianto de molekulo

DE multaj jaroj sciencistoj revas fari operacion al molekulo, por produkti novajn substancojn bezonatajn de la homoj. Nun la revo realiĝas.

Zhu Qingshi (Ĝu Ĉingŝi), esploristo de la Ĉina Akademio de Sciencoj, estas konata de la internaciaj kolegoj kiel aŭtoritatulo de la kampo de spektroskopio pri loka formacio de molekulo. Liaj esplor-fruktoj reprezentas la evoluon de la kampo.

Pri lia esplorado ni komencu de molekulo mem. Atomoj, kiuj formas molekulon, estas kunligitaj per kemiaj ligiloj. Ordinare, se oni donas energion al molekulo, do ĉiuj ĝiaj ligiloj vibros. Sed iam okazas, ke se oni donas energion al molekulo, do unu el ĝiaj ligiloj vibros kaj la aliaj ne. Trovinte tiun fazon, oni povas doni energion al iu kemia ligilo por rompi aŭ aktivigi ĝin por rekombini molekulon kaj formi novan substancan per ŝanĝo de molekula strukturo. Guste pri tio temas ligilo-selekta kemio.

La ŝlosilo por studi pri tiu kampo kuŝas en tio, ke oni devas trovi iun apartan fazon: Unu molekula ligilo vibras kaj la aliaj ne. Oni nomas la fazon vibrado de loka formacio.

Ligilo-selekta kemio, kiel nova stud-kampo, leviĝis antaŭ ĉ. 20 jaroj en la mondo. En la 20 jaroj multaj mondfamaj laboratorioj faris senlaca esploradon pri ĝi, sed ne sukcesis.

Junie de 1988, estis gajnita nova sukceso en la scienc-esplora historio de vibrado de loka formacio. S-ro Zhu Qingshi, kiel invitita esploristo de la Kembriĝa Universitato, faris penigan laboron dum duon-jaro. Per sia kreivo li faris observadon sur granda Fourier-transforma spektroskopio en tri tagoj kaj tri noktoj kaj unuafoje en la mondo trovis vibradon de loka formacio de germania molekulo. Reveninte al Ĉinio, li plibonigis la metodon uzatan en Kembriĝo kaj trovis serion da vibrado de loka formacio de silana molekulo.

Laŭ ĉio ĉi Zhu Qingshi fondis teorion pri vibrado de loka formacio, klarigante, en kia stato aperas vibrado de loka formacio kaj kiel uzi tiun fazon en molekula operacio. Li jam publikigis 24 disertaĵojn tiurilate.

Molekula spektroskopio, kiel bazo de kemio, estas scienco por studi pri molekulo per spektro. Kontraŭ la ekzemploj pri vibrado de loka formacio, trovitaj de Zhu Qingshi, la tradicia teorio pri molekula spektroskopio alfrontas severan defion. Kiam Zhu Qingshi starigis novan spektroskopion taŭgan por vibrado de loka formacio, li fondis ĝenerale uzatan molekulan spektroskopion kun vibrado de loka formacio kiel la bazo.

La eltrovo de Zhu Qingshi vekis grandegan atenton de la akademiaj rondoj en- kaj eksterlandaj. Profesoro de la Princetona Universitato de Usono diris: "Oni diskutis pri vibrado de loka formacio jam multajn jarojn, kaj via silana spektro unuafoje montris, ke tio ja estas vibrado de loka formacio."

Zhu Qingshi ĝuas vastan renomon. La "Spektra Kemio", aŭtoritata revuo de la monda molekula spektroskopio, dufoje kandidatigis lin por Thomson-premio. Li estis multfoje invitita kiel esploristo, unuaranga profesoro kaj supera sciencisto kaj prelegis en mondfamaj sciencaj institucioj, kiaj la Reĝa Societo de Britio, Kembriĝa Universitato kaj Oksforda Universitato. En 1991 45-jara Zhu Qingshi estis elektita kiel membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj.

En aŭgusto 1979 Zhu Qingshi forveturis eksterlanden por fari pluan studadon. Kiam li atingis la celitan landon, li trovis eksperimentajn ekipaĵojn neniam viditaj, por ne paroli pri ilia uzo; li posedis nur iujn popular-sciencajn sciojn pri la studobjekto; referencaj dokumentoj estis malfacile legeblaj por li; li ne povis flue paroli la fremdan lingvon... Ĉio ĉi malhelpis lin fari profundan studadon. La spertoj pruvis, ke li devas dediĉi sian energion al ŝlosila problemo por kiel eble plej rapide venki la malfacilaĵojn. Sekve, li kopiis gravajn dokumentojn kaj ĉiam kunportis ilin. Li remaĉis ilin frazon post frazo, ĝis li tute komprenis ilin. Ĉiutage li laboris dekelkajn horojn kaj ne havis tempon sin distri. Iutage li finfine desegnis sur registrilo fluorospektrom de la libera radikalo de kalcia hidroksido, estigitan de laserradioj. Unu jaron poste, lia instruanto prof. Stanfield prezentis lin en akademia konferenco, dirante: "Por la laboro, kiun s-ro Zhu faris en kelkaj semajnoj, ordinaruloj bezonas unu jaron."

Nun Zhu Qingshi laboras por fondi laboratorion de molekula spektro kaj lasera kemio en la Ĉina Scienc-Teknika Universitato kaj strebas pli alten — fari operacion al molekulo per vibrado de loka formacio de molekulo.

Krom tio, Zhu Qingshi ankaŭ gvidas junajn sciencistojn al nova kulmino de scienco. En la pasintaj dek jaroj li elkulturis nombron da elstaraj sciencistoj. ■

Verdigantoj de Funiu-monto

EN la daŭro de malpli ol unu semajno ĉesis lerni duono de la lernantoj de la Forstokultura Mezlernejo de Dinghe. Tio okazis en la vintro de 1984, en la dua jaro post la naskiĝo de la lernejo. Kial ili forlasis la lernejon? Ĝi estas ordinara profesia mezlernejo kaj por ĝiaj diplomitoj neblas sin ekzameni por altaj lernejoj, nek funkcii kiel oficialaj laborantoj de la ŝtato. En la okuloj de la lernantoj oni lernas en ĝi ĝuste por sin liberigi el malriĉeco.

La mezlernejo estas en la regiono de Funiu-monto, Henan-provinco, Ĉinio. Tiam la lernejo, samkiel proksimaj lokoj, estis minacata de vivkrizo.

Sed tiam la estroj kaj instruistoj de la lernejo aspektis eksterordinare aplombaj. Tage ili instruis, donis hejmtaskon al la lernantoj kaj okazigis amuzajn aktivadojn... Sed vespere ili longe diskutis por fari gravan decidon.

Oni invitis s-ron Zhu Hongyun, superan inĝenieron de forstokulturo, kaj li loĝis 5 sinsekvajn tagojn en la lernejo. S-ro Zhu diris al la lernantoj, ke lia hejmloko estas en suda Ĉinio. Li decidis studi en forstokultura instituto por la verda afero de la homaro. Fininte la studentan vivon, li rajtis funkcii kiel instruisto de instituto en suda Ĉinio, sed li eklaboris en la regiono de Funiu-monto, ĉar ĝi estas en la regiono transira de subtropika zono al norda mezvarma zono kaj tie abundis biologiaj riĉfontoj, sed la montoj kalviĝis kaj la riveroj sekiĝis pro blinda reformado de la naturo.

Maljuna instruisto Liu Hailou, suferanta de nekuracebla malsano, rifuzis enhospitaliĝon kaj daŭrigis sian instruadon tage, kaj vespere pacience interparolis kun la geknaboj, kiuj intencis ĉesigi sian lernadon. Liaj lernantoj kun larmoj en la okuloj diris: "Ho, sinjoro instruisto, vi estu trankvila kaj enhospitaliĝu! Ni certe daŭrigos la lernadon ĝis la diplomiĝo!"

"Kion fari por bonhaviĝo en la montregiono?"

La lernejo organizis varman diskuton pri la temo. La diskuto firmigis la decidon de la geknaboj daŭrigi sian lernadon: Por bonhaviĝo en la montregiono oni devas meti sian esperon sur la monton kaj turni sian atenton al forstokulturo. En la lernejo la verdigantoj-geknaboj bone komprenis tion.

Ili ne plu volis forlasi la lernejon. "Sed kiamaniere la lernejo povas doni al la geknaboj praktikajn kapablojn?" Tio fariĝis tuj solvenda problemo. Tiam al la lernejo mankis eksperimenta kampo. Ĉu oni povus terkulturi sur nigra tabulo kaj planti arbojn sur hejmtaskaj kajeroj? La instruistoj kaj lernantoj denove aranĝis la lernejan korton. Ili ekspluatis entute 58 eksperimentajn terpecojn, kie la geknaboj elkulturis bedojn da arbidoj kaj ellernis grefton de fruktarboj. De tiam eksperimentado estis farata eksterdome.

Sed la eksperimenta kampo kun areo de malpli ol 2 000 kvadrataj metroj estis tro malgranda por fari pli multe da scienc-esploraj agadoj. Poste, kiam la lernejo akiris sufiĉe da spertoj pri transplantado de arbidoj, ĝi subskribis kun proksima vilaĝo kontrakton pri arbarizado de 33 hektaroj sur kalvaj montoj en 50 jaroj. Tiuj kalvaj montoj fariĝis eksperimentejoj de la lernantoj. Ili mezuris areon kaj alton de monto, esploris pri tero, observis metean ŝanĝiĝon, faris racian aranĝon al ĉiuj terpecoj de la montoj kaj plantis sur ili arbidojn. Pasis kelkaj jaroj kaj la dezertaj montoj jam fariĝis verdejoj.

La eksperimenta kampo de la Forstokultura Mezlernejo de Dinghe disvastiĝis kaj la plano pri funkciigado de la lernejo perfektigis. La instruistoj kaj lernantoj ĝojiĝis, ke sur la 34 milionoj da hektaroj da kampoj de la tuta gubernio ili povas plene disvolvi sian talenton. Ili aktivadis en la forstokultura instituto, ĝardenistika kampo, farmobieno kaj eĉ privataj fruktoĝardenoj de kampanoj.

En Dinghe-distrikto troviĝas Kuiwen-vilaĝo, kiu multe sukcesis en forstokulturo. La lernejo engaĝis vilaĝajn kadrojn kaj forstokulturistojn kiel kumulajn instruistojn kaj elkulturis ĉiujare 26 forstokul-



Direktado de fruktokulturo

turistojn por la vilaĝo. La lernejo helpis la vilaĝon solvi malfacilaĵojn en forstokulturado kaj la eksperimentaj studobjektoj de la lernejo estis plenumataj kune de la lernejo kaj vilaĝo.

Helpate de la lernejo, la vilaĝanoj de Kuiwen fariĝis pli kaj pli kuraĝaj en ekspluatado. Antaŭ kelkaj jaroj, pro la rapida disvolviĝo de forstokulturo, mankis en la merkato plantidoj, la vilaĝanoj do planis kultivi rapidkreskajn plantidojn kaj elbedigi ilin en la sama jaro. Dank' al tio ili povos duobligi la profiton. La ideo ja estis bona, sed oni neniam tion provis. "Ĉu ĝi sukcesos aŭ ne?" Instruistoj de la lernejo faris senprokrastan esploron sur kampoj kaj konkludis, ke kun favoraj kondiĉoj de Kuiwen, oni povas kultivi en ĝi rapidkreskajn plantidojn, sed oni devas fini grefton inter la 1-a kaj la 10-a de julio. Se oni faras grefton antaŭ tiuj tagoj, do la ligneca grado de la plantidoj ne maturiĝas, kaj plie, pro la malalta ter-temperaturo, la procento de la maturiĝintaj arbidoj estas malgranda. Se oni faras tion post tiuj tagoj, do malsufiĉas varmaj tagoj por kreskigi plantidojn, kio malhelpas ilian konkurencon en la merkato. La lernejo taskis grefton al si kaj en la temperaturo 37°-38°C la instruistoj kaj lernantoj kune laboris semajnon po 14 horojn ĉiutage kaj greftis 3 hektarojn da arbidoj.

La lernejo havas dosieron de ĉiuj lernantoj. En la dosiero skribiĝas, kiom da familiaj membroj, kiom da hektaroj da kampoj, montoj kaj arboj kaj kiom da jara enspezo de la familio. La forstokultura lernejo rigardas la studon de la lernantoj kaj ilian personan karieron kiel unu tuton kaj faras penadon, por ke la lernantoj bonhaviĝu jam antaŭ diplomiĝo kaj estu taŭgaj forstokulturistoj post diplomiĝo. Ĝuste pro tio, revenis al la lernejo por daŭra lernado la geknaboj, kiuj forlasis la lernejon.

El la dosiero de lernanto Li Yongcai, instruisto

informiĝis, ke lia familio havas 10.6 hektarojn da montodekliva tero kaj 0.2 hektaron da agro, sed la jara enspezo de ĉiu familiano estis nur 178 juanoj. Li do helpis Li Yongcai en lia planado por bonhaviĝo pere de forstokulturado: Unue, ekspluati 0.2 hektaron da surroka kampo ĉe rivero kaj tie planti pinojn, eŭkomiojn (*Eucommia ulmoides*), aktinidion (*Actinidia chinensis*) k.a. Ili vendis 200 000 arbidojn en la jaro. Due, fari racian aranĝon de la 10.6 hektaroj kaj planti uruŝiojn, gumarbojn sur sunflankaj deklivoj kaj makorkarpojn (*Macorcarpium officinale*) sur la ombrataj deklivoj. Trie, konstrui 6-hektaran kaŝtan-arb-kampon, kiam Li Yongcai lernis en la 3-a klaso. Pro tio la familio de Li bonhaviĝis ĉe lia diplomiĝo.

Estis alia lernanto Hu Huicheng. Lia familio malprofitis de kulturado de fruktoĝardeno farita laŭ kontrakto. La tuta familio estis maĝoĝa pro tio. Instruisto diris al la patro de Hu: "Via filo lernas ĉe ni. Kion vi timas pri la malprofito?" La instruisto kaj liaj lernantoj do eklaboris sur la 3 hektaroj da montaj kampoj de Hu. Ili dividis la kampojn en 5 parcelojn. Nun tie kreskas oranĝarboj, persikarboj, prunarboj, pomarboj kaj makorkarpoj. Maje de 1990, fakuloj de la Forstokultura Ministerio de Ĉinio vizitis la tridimensian verdigan konstruon kaj laŭdis Hu, ke li faris paŝon antaŭen en disvolviĝo de verdaj entreprenoj. Hu respondis: "Mi estas lernanto de la forstokultura mezlernejo."

La lernantoj de la mezlernejo de Dinghe estas favorataj. En la lernejo ili estas nutrataj per scioj kaj post diplomiĝo ili estas daŭre prizorgataj de la lernejo. La lernejo daŭre helpas ilin en kariero, ekz., helpi ilin, kiel longigi la vivon de uruŝio, kiel prilabori aktinidian kampon, kiel grefti kaŝtanarbojn... Nun en la 296 vilaĝoj de la gubernio vidiĝas spuroj de la lernantoj kaj dank' al ilia penado verdiĝas Funiu-monto. ■

Post reformado de la sistemo de ter-dispono

de LI YI

LA komuna proprieto de la tero de Ĉinio estis legalizita en la 50-aj jaroj, dum la tutlanda Agrara Reformado. De tiam ĝis la 80-aj jaroj, kiam oni bezonis teron por la konstruado de urbo kaj industrio kaj por socia afero, oni petis de koncerna instanco la bezonatan pecon da tero, kaj la instanco senpage liveris teron al la petanto. Oni povis ĉiam disponi la teron. La unika premiso estis malpermesi vendon de la tero. Tiu unika limigo turnis la teron de Ĉinio en kapitalon sen prezo kaj merkato. Tiel la ŝtata tero fariĝis posedaĵo de konkretaj departementoj, dum la ŝtata proprieto estis nominala kaj la rajto de dispono estis efektiva.

Post la 80-aj jaroj la senvalora tero de Ĉinio ekhavis prezon, kaj plialtiĝis la prezo tago post tago. Unu el la ĉefaj kialoj estas tio, ke post la ekpraktikado de la politiko de reformado kaj pordomalfermo apudmaraj regionoj enkondukis eksterlandan kapitalon por fondi kune investitajn entreprenojn, kaj kompreneble la unua problemo estis havi teron. Tiel la pago por dispono de tero en la unua tempo fariĝis kontraŭpaga transdono de tero, kaj komenciĝis la ŝanĝiĝo de la sistemo de ter-dispono en Ĉinio.

La ŝanĝiĝo de la sistemo de ter-dispono komencita en 1987 ĉefe celis turni senpagan ter-disponon en kontraŭpagan por starigi sistemon limigi la ter-disponantojn — pagigi ilin por ilia ter-dispono. La afero tute natura por okcidentanoj vekis nemalgrandan skuon en Ĉinio. Sed tiam la tero kun prezo centoble altigita alportis al la ŝtato kaj lokaj registaroj rimarkindajn ekonomiajn interesojn, kaj la homoj ne povis ne fronti al la realaĵo: la tero estas ne nur riĉfonto, kiu havas neanstataŭigeblan valoron de uzo, sed ankaŭ grandega kapitalo, kiu havas valoron de interŝanĝo. Samtempe kun tio la Agrara Reformado de Ĉinio difinis distingon de proprieto kaj dispono kiel novan celon, nome la ŝtata proprieto de tero restu senŝanĝa, sed la dispono estu pli libera kaj oni iom post iom puŝu la teron sur merkaton, por ke ĝi fariĝu moviĝanta produkta elemento kaj efektiviĝu la plej racia dispozicio de la riĉfonto.

Sed ĝuste kiam la ŝtato komencis praktiki la politikon, la registaro estis surprizita de subita fenomeno involvinta la tutan landon, t.e. blinda ekspluato kaj eksterrajta livero de tero kaj spekulacio pri tero. Kaŭze de tio multaj bonaj kampoj fariĝis konstruejoj, kaj eĉ perdiĝis la ŝtata tero. En iuj lokoj oni jam liveris teron, sed ne venis investantoj, kaj la tero restis neutiligata. Nun la ŝtata tero, kontraŭpage uzata, estas nur dekono de la totala sumo, kiun la registaro intencas liveri. Fakte, kiu disponas teron, tiu estas mastro de la tero, kaj la ŝtata proprieto estas nominala. La distingo de proprieto kaj dispono estas senvalida. Pro tio la homoj, kiuj konsciis la seriozecon de la problemo, multe atentigis: La tero apartenas al la ŝtato! Do kiu povas defendi la interesojn de la ŝtato?

En la pasinteco ĉinoj ofte estis kontentaj pro la vasteco de la

teritorio. Sed la fakto ne estas tia, kian optimistoj opinias. Jes, la teritorio de Ĉinio konsistigas 1/15 de la monda tero, kaj pro tio Ĉinio estas la tria granda lando en la mondo. Sed la loĝantaro de Ĉinio estas grandega, kaj la areo posedata de ĉiu ĉino estas apenaŭ triono de la pokapa areo de la mondo, kaj la agro posedata de ĉiu ĉino estas malpli multa, nur 1/4 de la pokapa agro de la mondo. Krome daŭras la tendenco de malmultiĝo de agroj. En tia situacio la ĉina registaro refoje akcentis la agraran politikon de la ŝtato: “Mangajaĵo estas la plej grava afero de la popolo”, pli ol miliardo da homoj bezonas mangajaĵojn, tio estas la plej grava afero. Tial oni devas domaĝi kaj racie disponi ĉiun pecon da tero kaj efike protekti agroj. Samtempe la ĉina registaro akcentis, ke la tero estas grava riĉfonto kaj grava kapitalo de la ŝtato. La dono de rajto disponi teron devas esti monopoligita de la ŝtato kaj la livero de tero devas esti regata de la ŝtato, tio inkluzivas liveratan kvanton, liveran kanalon, prezon, celon de peto pri tero kaj proprieta registro.

Rilate la teron, kiun oni petis, sed dumlonge ne utiligis, la “Regularo pri Administrado de Urbaj Domoj kaj Tero”, kiun oni ekpraktikis en Ĉinio la 1-an de januaro 1995, difinis: “Tiu, kiu akiris rajton de ter-dispono per ceda maniero por domkonstruado, nepre devas utiligi la teron laŭ la celo kaj dato difinitaj en kontrakto pri cedo de rajto de ter-dispono. Se oni ankoraŭ ne utiligas la teron unu jaron post la limdato, oni devas pagi maksimume 20% kiom la pago por la ter-dispono. Se post du jaroj oni ankoraŭ ne komencas utiligi la teron, la registaro senkompanse reprenos la rajton de ter-dispono.” ■

EN Brazilo estas urbeto malfacile trovebla sur ordinara mapo. Tie vivas 18 000 loĝantoj kaj funkcias 11 piedpilkaj ludkampoj. Ĉiumatene multaj homoj iras tien por rigardi trejnadon de piedpilkistoj, inter kiuj estas la 22-membra Ĉina Knaba Piedpilka Teamo. En la teamo la plej juna aĝas 14 jarojn kaj la plej aĝa havas 17 jarojn. Ili atingis Brazilon la 9-an de novembro 1992.

Gvidanto de la Ĉina Knaba Piedpilka Teamo diris: “La nivelo de ĉinaj piedpilkistoj nun estas malproksima de la monda nivelo. Ni revas akiri en Brazilo, la piedpilka regno, la kapablecon vigli en la estonteco en la mondskala piedpilka konkurso.”

Kiam mi atingis la loĝejon de la junaj ĉinaj piedpilkistoj, ili kolektiĝis por trejnado. Ilia loĝejo distancas de la trejnejo je 10 minutoj de aŭtoveturado.

Sub la gvido de trejnisto, la knaboj energie trejnis sin. Oni legis sur ilia juna, sunbruna vizaĝo, ke ili multe spertis.

Ilia brazila trejnisto iam laboris kiel trejnisto en 9 knabaj piedpilkaj kluboj kaj la de li gviditaj 6 teamoj gajnis ĉampionecon de Brazilo. Lia trejna taktiko de romba formo akcentas la makrogvidon, lasante al piedpilkistoj mem decidi la ludmanieron. Tio multe vigligis ilin sur ludejo kaj formis ilian propran konkursan stilon.

Li opinias, ke por la venko oni devas unue venki sin mem, havi sufiĉan memfidon. Kaj laŭdado estas la plej efika metodo por kulturi la memfidon de knaboj. Li diris: “Mi esperas, ke miaj junaj trejnatoj fariĝos membroj de la ŝtata piedpilka teamo kaj gajnos la mondpokalan ĉampionecon.”

Junaj piedpilkistoj diris: “Ni venis ĉi tien ja por nin trejni.” Ĝuste dank’ al tiuj ambicio kaj memfido ili energie trejnis sin.

En Brazilo ili ekhavis tute novan konon, ke bravaj piedpilkistoj nepre devas bone lerni la kulturon, nur tiam ili povas bone kompreni trejniston kaj piedpilkon.

XIAO NAN:

Junaj ĉinaj piedpilkistoj en Brazilo


Sabate kaj dimanĉe ili partoprenas aŭ spektas konkursojn. Ĉiun posttagmezon ili trejnas sin 2 horojn kaj duonon. Antaŭtagmeze de lundo, merkredo kaj vendredo ili diligente lernas en klasĉambro.

Scipovi ludi piedpilkon cerbumante, jen la alia rikolto de la knaboj en Brazilo. Nelonge post sia atingo, ili konkursis kun la loka knaba piedpilka teamo. Kvankam la ĉinaj knaboj venkis, tamen la ludo profunde impresis la ĉinajn knabojn per lerta kaj rapida piedmovo de la brazilaj knaboj.

En Brazilo, kaj en urboj kaj en vilaĝoj, ĉie oni ludas piedpilkon. En tiu lando troviĝas pli ol 8 000 piedpilkaj kluboj. Oni povas rigardi konkurson ĉiutage. Komence la ĉinaj piedpilkistoj rajtis partopreni nur invitajn kaj amikajn konkursojn. Poste oni sankciis fondiĝon de la Internacia Piedpilka Klubo de Ĉinoj en Brazilo. Dank’ al tio, ili povas multe partopreni en brazilaj piedpilkaj konkursoj.

La Ĉina Knaba Piedpilka Teamo havas sian propran ĉambron, kie la knaboj lernas kaj sin amuzas. Sur ĝia pordo legiĝas vortoj: “SOPIRO AL LA HEJMO.” Kiel ili, 16-17-jaruloj, povas ne sopiri al sia hejmloko? Ili ĉiam emociiĝis, kiam ili aŭdis telefonvokon kaj ricevis leteron el Ĉinio kaj objekton el la hejmo. Ili ĝojis eĉ renkontante raportiston el Ĉinio. Por piedpilkado ili volentas resti ankoraŭ 4 jarojn en Brazilo. ■

Junaj ĉinaj piedpilkistoj en trejnado



Ŝipfarado en la antikva Ĉinio

de ZHOU CHENG

MULTAJ regionoj de Ĉinio havas reton da riveroj kun lagoj kiel nodo, kaj oriente kaj sude de la ĉeftero de Ĉinio estas vastaj maroj. Sekve, Ĉinio havas grandan oportunecon por ŝipveturo. Arkeologiaj esploroj, faritaj en la pasintaj dekoj da jaroj, pluaŝe konfirmis, ke jam en neolitiko, t.e., antaŭ ĉ. 10 000-4 000 jaroj, la prapatroj de la ĉina nacio transpasis la stadion de naturaj veturiloj kaj posedis la teknikon de ŝipfarado kaj navigado.

Historiaj libroj notas, ke en la primitiva socio la prauloj vivtenis sin per fiŝado, ĉasado kaj kolekto. Ili vivis proksime de rivero aŭ lago. Por kapti fiŝojn en profunda akvo, ĉasi bestojn trans rivero kaj fuĝi de inundo, la prauloj kreis floson, inspirite de flosaĵo sur akvo. Ĝi estis la plej frua surakva trafikilo, plataĵo farita el kelke da

trunkoj de arbo aŭ bambuo, kaj povis flosi sur akvo ŝarĝite per objektoj. Post tio ili kreis pirogon, kies formo videblas sur antikvaj rokbildoj kaj koloraj fajencaĵoj. Ekzemple, en 1958 oni elterigis en Shaanxi-provinco neolitikan ŝipforman fajencan kruĉon kun desegno de fiŝreto. En 1960 oni trovis ŝipeton kun alte levitaj pruo kaj pobo sur antikva rokbildo ĉe Mudan-rivero en nordorienta Ĉinio. En 1958 oni trovis en la provinco Zhejiang kelkajn lignajn remilojn de neolitiko. Ĉiuj tiuj objektoj pruvis, ke siatempe en vastaj regionoj de suda kaj norda Ĉinio viglis ŝipoj sur akvo.

Kiam flosoj kaj pirogoj jam ne povis kovri la bezonon de la vivo, oni aldonis al pirogo tabulojn, kaj el tio kreigis novtipa ŝipo. En la skribo sur testuda ŝelo aŭ alibesta osto farita antaŭ 3 000-4 000 jaroj estas la ideogramo "ŝipo". Kaj historia libro notas, ke antaŭ 3 600

jaroj reĝo de regno Wu kaj liaj trupoj transiris riveron per ŝipo por militi.


Pirogo fariĝis tabula ŝipo, tio markis gravan impeton en la historio de ŝipfarado de Ĉinio. La homoj jam liberigis sin el sub la kateno de la originaj formoj kaj grandeco de ligno en la naturo, sed povis laŭvole prilabori ĝin. Dank' al tio, estis faritaj grandaj luksaj ŝipoj, kio ebligis multajn imponajn spektaklojn pri rivera navigacio, surmara trafikado kaj surakva batalo.


En la dinastioj Qin kaj Han (221 a.K. — 220 p.K.) aperis la unua kulmino de ŝipfarado de Ĉinio. En tiu periodo oni povis fari diversajn ŝipojn, grandigi la skalon de ŝipfarado kaj kompletigi instalaĵojn por ankrado.

En 221 a.K. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio unuigis Ĉinion kaj starigis la dinastion Qin. Oni disvolvis la ŝiparan teknikon uzatan antaŭ la dinastio kaj elfaris multe da grandaj kaj malgrandaj ŝipoj. Ĝis nun ĉinaj arkeologoj ankoraŭ ne trovis ŝipon uzatan en Qin-dinastio, sed oni trovis en Kantono la ruĥon de tri dokoj de la dinastioj Qin kaj Han. Tiuj dokoj estis destinitaj por fari lignan ŝipon kun longo de 30 metroj, larĝo de 6-8 metroj kaj kapacito de 50-60 toneloj.

Poste oni ne kontentigis pri laŭflua flosado kaj volis direkti ŝipon laŭ bezono. Ĉu por veturi kontraŭ fluo, ĉu por halti, ĉu por alborĝi, oni senescepte bezonis movfortan instrumenton. Por tiu celo oni kreis pagajon, remilon, hok-stangon, rudron, maston, velon kaj ŝtonan ankron.

Ŝipo en la pentraĵo "Apud Rivero en la Festo de Klara kaj Brilo" de Zhang Zeduan de Song-dinastio (960-1279)





Ŝipo en la pentraĵo "Pri Diino de Luoshui-rivero" de Gu Kaizhi (346-407)

La ŝipmodeloj de Han-dinastio trovitaj en Changsha kaj Kantono vidigis, ke la tiama ŝipo havis perfektan strukturon: ĉe la pruo estas ankro kaj ambaŭflanke de ĝi remilingoj. En ĝi estas antaŭa, meza kaj malantaŭa holdoj kaj ĉe la pobo — gvatturo kaj rudro.

En la postaj 700 jaroj malrapide disvolviĝis ŝipfarado de Ĉinio. Tamen menciindas jonko kaj hermetika holdo uzataj en tiu periodo.

En la antikva Ĉinio estis multaj specoj de ŝipoj, sed laŭ formo ili povis esti dividitaj en du kategoriojn: ŝipo kun kvadrata pruo kaj plata fundo kaj tiu kun pintaj pruo kaj fundo. Jonko estas tipo de la unua kategorio. Ĝi estas granda, plata kaj malprofunda, ke ĝi malmulte balanciĝas, malprofunde mergiĝas, malofte grundas. Krome, ĝi ankaŭ povas havi plurajn mastojn por laŭeble veli.

La hermetika holdo estis farita laŭ la aranĝo: septi la kajuton en plurajn ĉelojn kaj hermetikigi ilin. Tiu aranĝo ne nur pligrandigas la transversan subportan forton de la korpo de ŝipo, sed ankaŭ ebligas protekti la ŝipon, kiam ĝi kolizias kontraŭ rifo kaj krevas unu aŭ du ĉeloj. Oni inventis hermetikan holdon en la 6-a jarcento, kaj tio estis granda kontribuo al la ŝipfara tekniko de la mondo. En la fino de la 18-a jarcento aliaj lan-

doj ekuzis tiun teknikon kaj instalas hermetikajn holdojn sur ŝipo.

En la dinastioj Song kaj Yuan (960-1368) Ĉinio havis tre prosperan surmaran trafikon kaj eksteran komercon, kaj tio rezultigis la duan kulminon de ŝipfarado de Ĉinio.

Historiaj libroj notas, ke tiam sur Yangzi-rivero veturis ĉiujare 200 000-300 000 ŝipoj, kaj sur la Flava Rivero pli ol 15 000. Ankaŭ la tiama martrafiko bezonis multe da ŝipoj. Por tiu bezono la ŝtato establis ŝipfarejojn en la urboj ĉe lago, rivero kaj maro. Iu el la ŝipfarejoj de Zhejiang-provinco povis fari ĉiujare 605 diversajn ŝipojn. En 1270 alia ŝipfarejo faris 5 000 ŝipojn unufoje.

En la dinastioj Song kaj Yuan oni malfermis surmarajn "ceramikajn vojojn" kaj dank' al tio rapide disvolviĝis farado de marŝipoj. Tiam Quanzhou de Fujian-provinco ĝuis renomon per farado de marŝipoj. Antaŭ nelonge oni trovis en Quanzhou ruinojn de ŝipfarejo kaj elterigis du marŝipojn de la Suda Song-dinastio. La restaĵo de unu el ili longas 24.20 metrojn, larĝas 9.15 metrojn kaj altas 1.92 metrojn. La ŝipo havis 13 hermetikajn holdojn kaj kapaciton de pli ol 200 toneloj, kun pinta pruo, pinta fundo kaj suprenlevitaj ekstremoj. Ĝi estas

unu el la realaĵoj de frua ŝipo de Fuzhou. Tia ŝipo havis klinigan fundon, grandan dismeton kaj povis facile fendi ondojn. Ĝi estis taŭga por navigi en malproksima maro, kie akvo fluis rapide kaj la ondoj furiozis. Fakuloj diris, ke la ŝipo restaŭrita havas longon de 35 metroj. Laŭ notoj en historiaj libroj, ĝi estis malgrandtipa en Song-dinastio.

Aplikado de kompasoj en navigado estis grandega revolucio de la navigacia tekniko de Ĉinio kaj metis finon al la epoko de primitiva navigacio de la homaro.

En Ming-dinastio (1368-1644) la vasteco de la dislokiĝo de ŝipfarejoj, iliaj skaloj kaj kompleco de ekipaĵoj estis senprecedencaj en la historio kaj puŝis ŝipfaradon al la tria kulmino.

La altan nivelon de ŝipfarado de Ming-dinastio elokvente pruvis la floto de Zheng He. De 1405 ĝis 1438, kiel delegito de la kortego, Zheng He sepfoje vizitis pli ol 30 landojn de Azio kaj Afriko kun sia granda floto. Ĉiufoje li gvidis floton el pli ol 100 ŝipoj, kaj 40-60 el ili estis grandtipaj. Sume 27 000 homoj veturis per tiu floto. "Genealogio de Zheng He" notas, ke la ŝipo de Zheng He estis jonkoforma, kun longo de 150 metroj, larĝo de 60 metroj kaj 12 veloj. La velo, ankro kaj rudro estis tiel grandaj, ke ilin manipulis 200-300 homoj samtempe. Dank' al la bonkvalitaj ŝipoj kaj eminenta manipulado, Zheng He venkis kapricajn ŝtormojn kaj ĉiufoje revenis en sekuro.

En tiu tempo, krom jonko kaj Fuzhou-stila ŝipo, oni konstruis ankaŭ kanton-stilan ŝipon kun pinta pruo kaj barela korpo kaj bird-ŝipon kun dika korpo, granda velo kaj fortika julo. Tiam fiksiĝis la sistemo de ĉinaj ŝipoj kun kvar tipoj. En la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911) Ĉinio havis lignajn ŝipojn de pli ol mil specoj, sed ĉiuj apartenis al tiuj de la supre diritaj kvar tipoj. ■

Kontakto kun tibetanoj

POST 36-hora veturado el la urbo Jiangyou (Ĝjangjoŭ) en la norda parto de Sichuan-provinco, ni atingis la pitoreskejon Jiuzhaigou (Ĝiŭĝajgoŭ).

De malproksime vidate, la loko aspektas kiel primitiva arbaro. La montosupro 3 800 m super la marnivelo estas kovrita de blanka neĝo. Granda kvanto da neĝakvo fluas el arbaroj jen rapide jen malrapide. En la loko, kie rapide fluas akvo, formiĝis akvofalo kaj, kie malrapide fluas akvo, baseno. En iuj lokoj koincidas akvofaloj kaj basenoj, kiuj aspektas kiel ŝtuparoj. Plej mirinde estas, ke larĝaj kaj profundaj basenoj bluas kiel marakvo kaj en la suno iuj el ili fariĝas bluaj kaj aliaj ruĝaj. Oni nomas ilin bunta baseno. En multaj lokoj arbedoj prosperas en akvo.

En pitoreska montaro vivas tibetanoj generacio post generacio. Mi loĝas en Pekino kaj malofte renkontiĝas kun tibetanoj. En Jiuzhaigou mi kun ĝojo kontaktiĝis kun ili.

RAJDI SUR ĈEVALO

Jiuzhaigou estas tute pura. Oni devas purigi sian veturilon, enirante en la lokon. Purigita, nia aŭto supreniris profunden de la arbaro. Mi kaj s-ro Wu Xunnan, ĉefredaktoro de EPC, kune vizitis la lokon. Ĉar la vojo fariĝis kruda kaj glita, la ŝoforo descendiĝis nin kaj ni devis piediri.

Tiam dekkelkaj tibetanoj venis al ni kun ĉevaloj kaj provis persvadi al ni rajdi sur ilia ĉevalo. Ili flue

parolis han-lingve kaj bone sciis pri kontaktiĝo kun turistoj. Gejunuloj unu post alia surĉevaliĝis kaj antaŭeniris. Pro malbona sanstato mi kaj s-ro Wu ne volis rajdi. Du tibetaj knabinoj nin sekvis kaj persistis en la persvadado. Sed mi kaj s-ro Wu ilin rifuzis per man- kaj kapskuadoj, tio malesperigis ilin. Ni silente iris. Subite iu el la 2 knabinoj ekkantis han-lingve. Ŝi kantis tre bele. Kiam mi kaj s-ro Wu ĝuis ŝian agrablajn kanton, ŝi eksilentis.

“Kiel bone vi kantas!” mi laŭdis.

La knabino restis ankoraŭ silenta kun klinita kapo. Ŝi, irante, karesis la bridon.

“Ĉu vi bonvolus kanti ankoraŭfoje?”

Ŝajnis, ke ŝi ne ĝojis. Oblikve rigardante min, ŝi respondis: “Ne! Mi ne kantas, se vi ne rajdos sur niaj ĉevaloj.”

Ho, ŝi koleretis. Mi kaj s-ro Wu ekridis, dirante: “Bone, ni surĉevaliĝu!”

La du knabinoj ekĝojis kaj nin surĉevaligis. Mi neniam rajdis sur ĉevalo kaj tial sur ĝi mi ŝanceliĝis pro perdo de la gravito. La knabino, kiu kondukis la ĉevalon, diris al mi: “Estu kuraĝa! Etendu viajn gambojn, forte piedpremu la pedalojn kaj streĉu la bridon!” Mi faris laŭ ŝia konsilo, ja vere mi ne plu timis.

Estis tre agrable ĝui la pejzaĝon de la arbaro surĉevale. Kiam mi deĉevaliĝis, la knabino etendis la manon al mi kaj diris:

“Pagu!”

“Kiom?”

“15 juanoj por unu ĉevalo!”

Mi ridis: “Ho, knabineto, ne tro pagigu! Ni jam konsentis pagi 10 juanojn por unu ĉevalo.”

Ruĝiĝante de honto, ŝi silentis. Mi kaj s-ro Wu pagis entute 20 juanojn.

Kiam ŝi akceptis la monon, ŝi elpoŝigis plenmanon da monpaperoj, el kiuj plejparto estis 100 juanoj. Mi demandis:

“Kiom da juanoj vi enspezas ĉiutage?”

“Pli ol cent juanojn.”

Tibetanoj vendantaj metiartaĵojn en Jiuzhaigou



La aŭtoro (meze) kun tibetaj knabinoj



“Kaj kiom monate?”

“2 000 — 3 000 juanojn.”

Mi diris kun surprizo: “Ho, kelkoble pli multe ol la enspezo de ni, urbanoj!”

Ŝi diris: “Sed nia laboro estas pli peniga!”

KONVERSACIO

Ĉe la bordo de iu “bunta baseno” mi levis foton por fari foton kaj tiam iu maljuna tibetano afable diris al mi: “Oni devas pagi por foti ĉi tie.”

“Kiom da juanoj?”

“Duonjuano!”

Ĉiuj gravaj vidindejoj de Jiuzhaigou estas gardataj de tibetanoj. Turistoj, kiuj volas fari foton en la loko, devas pagi.

Tiu maljunulo en purpura tibetstila robo senĝene sidis ĉe la vojo kaj kun rideto babilis kun ni.

“Kiom da juanoj vi enspezas jare per tiu malalta postulo?”

“Ĉirkaŭ 4 000 juanojn.”

“Kiom da familianoj vi havas?”

“Dek.”

“Ĉu ili ĉiuj laboras?”

Li kapjesis kaj sciigis al mi, ke iuj el ili laboras en montaro kaj aliaj ekstere. Dank’ al turismaj servoj, la tieaj tibetanoj sin riĉigis. La maljunulo volonte diris al mi, ke ĉiuj familioj de la loko deponis monon en bankoj.

“Ĉu vi deponas 100 000 juanojn ĉiujare?”

Kun rideto li kapneis: “Ne tiel multe, ĉ. 50 000 juanojn!”

“Por kio vi elspezas grandan monsumon?”

“Kiam oni havas monon, oni volas aĉeti ĉion. Pli ol 20 000 juanoj konsumiĝas ĉiujare!”

Bedaŭrinde, tempo ne sufiĉis por ni viziti tibetan hejmon. Ni nur vizitis la vilaĝon en aŭto dum veturado. Tie ĉie vidiĝas nove konstruitaj domoj kun kolojnove nove lakitaj kaj traboj kolorigitaj. La antaŭaj kabanoj ne plu vidiĝas.

FOTO POR MEMORO

Post 2-taga vizito en Jiuzhaigou, ni devis adiaŭi ĝin, sed mi forte deziris fari fotojn kune kun lokaj tibetanoj.

Feliĉe, alvenis al ni 2 tibetaj knabinoj antaŭ nia forlaso. Mi kaj s-ro Wu tuj eliris el la aŭto kaj demandis:

“Ĉu vi bonvolus foti vin kune kun ni?” Post momenta hezito ili konsentis kaj senĝene fotis sin kune kun ni. Mi tre ĝojis, ĉar estis la unua fojo por mi fari foton kun tibetanoj.

Unu el la 2 knabinoj nomiĝas Yema. Ŝi prezentis sin al ni: “Antaŭe mi paŝtis ŝafojn kaj neniam vizitis lernejon. Poste mi memlernis kaj mia klereco jam atingis tiun de elementa lernejo.”

“Ĉu vi havas laboron?” mi demandis.

“Jes, mi laboras en administra departemento de la pitoreskejo.”

Ŝi estis kontenta, ke ŝi, neklera paŝtistino, fariĝis funkciulo de la loka administracio. Je tio ŝi ekridis.

Yema donis al mi sian adreson kaj petis de mi sendi la foton al ŝi. Ĉe nia disiĝo la 2 knabinoj diris al ni svingante la manon: “Ĝis revido! Vi estas ĉiam bonvenaj!”

Revidi estas malfacile. Sed mi certe sendos al ŝi la foton, sur kiu ŝi revidos nin. ■

Novaj libroj eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

ĈINA CERAMIKO

Ĉinio estas hejmlando de porcelanaĵoj.

La ceramika produktado de Ĉinio komen-
ciĝis en neolitiko. La libro detale konigas
al vi la historion de la ĉina ceramiko.

Formato: 12 cm. × 18.4 cm. 260 p. kun 16
koloraj kaj 45 nigra-blankaj bildoj.

Prezo: 6.00 USD

Mendu ĉe Distribua Fako de EPC, Libro-
servo de UEA aŭ peranto de EPC en via
lando.



Ĉina tombejo en Jemeno

SUR montodeklivo en la okcidenta antaŭurbo de Sana, la ĉefurbo de la Araba Jemena Respubliko, estas tombejo de ĉinaj martiroj.

En la tombejo ripozas 50 ĉinaj inĝenieroj, teknikistoj, kuracistoj, flegistinoj, instruistoj kaj aliaj fakuloj. Plejparto de ili oferis sian vivon en helpado al la respubliko en industrio, agrikulturo, trafiko, kulturo, edukado kaj higieno, laŭ la kontraktoj subskribitaj de la jemena kaj ĉina registaroj post la sendependiĝo de la respubliko. Ili harmonie kunlaboris kun jemenanoj, timante nek suferojn nek danĝerojn. En la 60-aj jaroj ĉina inĝeniero Zhang venis al Jemeno por helpi ĝin en konstruado de la ŝoseo de Sana ĝis la havenurbo Hodeida. Li esploris topografion kaj ellaboris planon de konstruado. Foje, en eksplodigo li oferis sian vivon. Por memori lin la jemena registaro konstruigis tombejon sur la monto okcidente de Sana, de kie komenciĝas la ŝoseo, kaj starigis por li tomboŝtonon.

La ĉinaj helpantoj diligente laboris dekojn da jaroj por konstruado de Jemeno. La unua jemena kotona tekstilejo en Sana, tekstila fabriko en Adeno, teknika kolegio en Sana, popolaj hospitaloj en Taizz kaj Lahej, kulti-vejo Batne, ŝoseoj Sana-Hodeida kaj Sana-Sada, Eksterakomerca Domo kaj salfarejo en Adeno, Internacia Aerodromo en Sana, ĉiuj tiuj estis konstruitaj kun

helpo de ĉinoj. Nombro da teknikistoj, agronomoj, kuracistoj, profesoroj kaj aliaj fakuloj de Ĉinio laboris en Jemeno por helpi ĝin havi siajn proprajn fakulojn. En kuna laborado la ĉinoj kaj jemenanoj starigis profundan amikecon inter si, kaj nun ankoraŭ cirkulas rakontoj pri la amikeco inter la du popoloj.

En dekoj da jaroj la ĉinaj medicinaj trupoj servis en Jemeno kaj savis milojn kaj milojn da jemenanoj. Ili resanigis blindulojn, surdamutulojn kaj aliajn kriplulojn. Iu ĉina kuracisto oferis sian haŭton al jemena knabino, kiun minacis morto pro serioza brulvundo.

Jemenanoj multe helpis la ĉinojn en ilia laboro kaj ĉiutaga vivo. Ili laboris por la ĉinoj kiel vojevigdisto, serĉis akvon kaj

manĝaĵojn por ili kaj transportis al ili necesaĵojn. Ili dividis ĝojon kaj suferon kun la ĉinoj. Estas diro, ke la amikeco inter la ĉina kaj jemena popoloj estis formita el sango kaj ŝvito. Tion provis dekoj da tomboŝtonoj bonordaj en la tombejo de ĉinaj martiroj.

Antaŭ longe oni aldonis al la tombejo kioskon en ĉina stilo. Ĉirkaŭ la kiosko kreskas pinoj kaj floroj. En la ĉina tradicia tago por rememorigi pri forpasingoj, nome en la 4-a aŭ 5-a de aprilo, laborantoj de la ĉinaj ambasadorejo kaj konsulejo en Jemeno, dungitoj de ĉinaj kompanioj kaj aliaj venas al la tombejo por tion fari. Ankaŭ jemenanoj frekventas la tombejon por montri sian respekton al kaj karmemoron pri la ĉinaj martiroj. ■

Horaro de Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj (m)	kHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.51	7405
		40.16	7470
		30.11	9965
		19.52	15370
22:30-23:00	Latin-Ameriko	31.65	9480
		3.17	6950
11:00-11:30	Japanio, Koreio	43.13	6955
		31.65	9480
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.75	11650
		25.34	11840

Helpo de legantoj

— Resumo de la enketiloj por n-roj 1-6/1994

De la 5-a de junio 1994, kiam nin atingis la unuaj enketiloj resenditaj de s-roj Manfred Ritthaler (Germanio) kaj Lovis Marie Molle (Belgio), ĝis la 31-a de oktobro, al ni revenis entute 171 enketiloj el 36 landoj. Pli multaj inter ili venis el Francio, Germanio, Brazilo kaj Italio.

Pere de la enketiloj ni eksciis la opiniojn de niaj legantoj pri la 17 rubrikoj de EPC kaj pri eldonaĵoj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

1. Pri la rubrikoj de EPC

Laŭ la statistiko, 68 personoj signis sur la enketilo sian “ŝaton” al ĉiuj rubrikoj; kaj aliaj donis malsamajn signojn. Tio montras, ke la nuna enhavo de EPC estas ĝenerale akceptata de la legantoj, tamen la rubrikoj ricevis de ili malsamajn nombrojn de “ŝato” kaj “malŝato”. Pli ŝatataj rubrikoj estas “Esp-novaĵoj”, “Ĉina Kulturo”, “Bela Ĉinio”, “Voĉo de Esperantistoj”, “Inter Ni”, “Por Via Sano” k.a. Kompreneble en 1995 ni pli bone daŭrigas tiujn rubrikojn laŭ la deziro de plej multaj legantoj. Malpli ŝatataj rubrikoj estas “Ekonomie”, “Sur Scenejo” k.a. Sed iuj legantoj interesiĝas pri “Ekonomie”, ekz. gesinjoroj Aira kaj Erkki “Röntynen (Finnlando) skribis: “La bona revuo estas tia, ke en ĝi diversaj legantoj trovas temojn konvenajn por ili”, kaj petas nin “skribi pli analize ol antaŭe ekz. pri sociaj kaj ekonomiaj aferoj”, tial ni daŭrigas tiun rubrikon. La aliaj rubrikoj estas iom ŝanĝitaj, sed ni konservas la varian karakteron de la revuo. Bone skribis s-ro Jaan Ojalo (Estonio): “En la enketo mi notis nur miajn personajn ŝatojn de la artikoloj en via diversflanka temaro, per kio EPC restas la kulmino de E-gazetaro. Ĉiu leganto povas havi sian propran ŝaton, pro kio mi ne notis malŝatojn, kiujn ankaŭ mi persone ne havas.”

2. Pri eldonaĵoj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Je la demando ĉu vi iam legis E-librojn eldonitajn de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, 106 personoj respondis per “jes”, 52 personoj per “ne”, 13 personoj per “rezigno”. La de ili proponitaj aŭ ŝatataj temoj plejparte tuŝas infanajn eldonaĵojn, krome

Redaktoroj traktas leterojn de legantoj.



ankaŭ literaturon, historion, Esperanto-movadon k.a. Ili prezentis entute 44 proponojn rilate temojn por libroj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Tiu enketo ludas konsultan rolon por niaj venontaj E-eldonaĵoj.

3. Pri artikoloj de EPC

Multaj legantoj skribis sur la enketilo sian opinion pri EPC kaj donis al ĝi altan takson. Ekzemple, s-ro Hristo Manolov (Bulgario) skribis: “Ĉiam kun malpacienca mi atendas la alvenon de la sekva numero. Ja la gazeto estas ne nur enlanda, sed fakte internacia, reflektanta ankaŭ la situacion de la internacia Esperanto-movado. Sen komplimento ĝi dumlonge gajnis la unuan lokon inter ĉiuj E-eldonaĵoj pro sia enhavo kaj arta aranĝo de la materialoj. Nur pere de ĝi ni, bulgaraj esperantistoj, povas ekscii, kiel marŝas la popola Ĉinio en novaj cirkonstancoj.” Similajn vortojn skribis ankaŭ Clein (Brazilo), ges-roj Aira kaj Erkki Röntynen (Finnlando), s-ro Razen Manandhar (Nepalo), d-ro Dino Fabris (Italio), s-ro Jaan Ojalo (Estonio) k.a. Ili multe kuraĝigis niajn laborantojn kaj kunlaborantojn.

Iuj legantoj sincere prezentis sian kritikon kontraŭ vortuzo kaj bildoj de nia revuo. Pro tio ni kore dankas ilin.

Troviĝas ankaŭ multaj proponitaj novaj temoj por EPC. Ekz. “aperigi artikolon pri la laborantoj de la Esperanta sekcio de la Ĉina Radio Internacia”, “multflanke raporti la vivon kaj vivnivelon de la ĉina popolo”, “pli multe aperigi artikolojn pri literaturo kaj Esperanto” ktp. En 1995 ni klopodas kontentigi tiujn legantojn. Tamen temoj, kiujn eble proponis novaj legantoj, estas publikigitaj en la pasintaj jaroj kaj nuntempe nearanĝeblaj. Pro tio ni kore petas ilian pardonon kaj komprenon.

Por malpezigi la ŝarĝon de niaj legantoj, en 1995 ni kunsendos nur unu enketilon ĝenerale kune kun la 3-a n-ro kaj esperas, ke pli multaj legantoj reagos al nia enketo.

La Red.

HIFANTRIOJ EKSTERMITAJ

Hifantrioj (*Hyphantria cunea* Drury) furiozis sur Eŭrazio kaj plagis la basenon de Weihe-rivero en Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco, Ĉinio. Ili finfine estis ekstermitaj de juna ĉina entomologo. En la arbaroj de la nomita provinco ne vidiĝis hifantrioj jam 5 jarojn kaj la arboj kreskas prospere. Vicprofesoro Yang Zhongqi de la Nordokcidenta Forstokultura Instituto de Ĉinio rikoltis sukceson en preventado kaj mortigo de hifantrioj per coŭioj (*Chouioia cunea* Yang). La tekniko estis enlistigita de la ŝtato kiel unu el la 8 gravaj atingoj de la ĉina arbara entomologio akiritaj en la lastaj jaroj.

La hifantrioj naskiĝis en Usono kaj Kanado kaj atakis dekojn da landoj de Eŭropo kaj Azio en la lastaj pli ol 40 jaroj. Kien ili atingis, tie la folioj de arboj kaj aliaj plantoj estis formanĝitaj. Pro tio, ke la hifantrioj rapide reproduktiĝas kaj iliaj larvoj povas teksti reton el la de ili mem sekreciitaj maldikaj fadenoj, estis senefike mortigi ilin per insekticido. Eksterlandanoj faris esploradon pri biopreventado kontraŭ naturaj malamikoj, tamen la efiko ne estis ideala. En 1984 la hifantrioj plagis gubernion de Shaanxi-provinco kaj atakis aliajn guberniojn kaj lokojn. Yang Zhongqi trovis iun el la pli ol 50 specioj da parazitaj fiinsektoj, kolektitaj kaj breditaj de li. Parazita procentaĵo de la kalcoj (*Chalcid wasp*) en la korpoj de la hifantrioj superis 80%. Ili ofte ellasas ovojn en la pupojn de la hifantrioj. En temperaturo de 30°C, post 15 tagoj la ovoj transformiĝas en larvojn, kiuj rapide formanĝas la nutraĵon kaj organojn de la pupo de la hifantrioj. Poste ili pupiĝas kaj formiĝas en kalcojn, ili eliĝas morde detruinte la korpojn de la hifantrioj, kaj tiel mortas larvoj kaj pupoj de la hifantrioj. Post plurjara sistematika studado, vicprofesoro Yang Zhongqi determinis, ke ili apartenas al la familio de la kalcoj, kiujn konfirmis mondfamaj fakuloj pri parazitaj vespoj. Yang Zhongqi kaj liaj kolegoj faris multfojan provadon de arta reproduktiĝo kaj solvis teknikan malfacilon en grandkvanta reproduktado.

Nun, Yang Zhongqi jam trovis 126 novajn speciojn da parazitaj vespoj de 8 novaj genroj kaj malfermis novan kampon por bioprevento kaj mortigo de fiinsektoj por arbaroj kaj aliaj plantoj en Ĉinio.

SOMERAJ GLACI-KAVERNOJ

Lastatempe en Sichuan-provinco oni eltrovis naturan someran glaci-kavernaron.

La eltrovitaj 3 someraj glaci-kavernoj ĉiu kun profundo de ĉ. 30 m, larĝo de ĉ. 20 m kaj alto de 10 m situas 2 100-2 200 m super la marnivelo. Ekster

la kavernoj prosperas arbedoj. Junie interne de la kavernoj akvogutoj glaciĝas kaj en oktobro la glaci-pendaĵoj degelas. Ju pli varmiĝas la vetero ekstere, des pli multiĝas kaj dikiĝas la glaci-pendaĵoj interne de la kavernoj.

En varma somero temperaturo en la kavernoj estas pli ol 10°C sub la nulo kaj ĉie briletas glaciaĵoj. Enirinte en la kavernojn, oni kvazaŭ estas en grandega fridujo kaj sentas sin malvarme. Sub la plafono pendas glaciaĵoj kun dika supro kaj maldika malsupro kvazaŭ stalaktito. Ili kun diametro de ĉ. 1 m kaj alto de pli ol 8 m pendas en la aero. Akvogutoj malsupren glitas kaj glaciĝas en palpebruma daŭro, tiel ke la glaci-pendaĵoj senĉese dikiĝas. Sennombraj malgrandaj glaci-pendaĵoj, kiel arĝentaj pingloj, pendas ĉirkaŭe sur la grandaj glaci-pendaĵoj. La 4 glaci-fontoj kiel naturaj kurtenoj pendas sur la muroj de la kaverno. Iu similas al breĉiĝanta Laktovojo, alia imponas kvazaŭ torenta rivero, tria pendas kiel akva kurteno kaj kvara prezentiĝas kiel klara rivereto trapasanta valon. Sub la volbo de la kaverno pendas sennombraj glaci-flo-roj, grandaj kaj malgrandaj... Kiel formiĝis la natura mirindaĵo, pri kio fakuloj nun esploras.

TEKSITA PENTRAĴO EL PAPERĜO


La teksita pentraĵo el papero estas delikate farita permane. La farado konsistas el desegnado, tranĉado kaj teksado. Unue oni desegnas bildon sur *ŝĵuan*-papero, propra al Ĉinio, kaj per speciala tranĉileto tranĉas la paperon laŭ la difinitaj normoj en unuformajn striojn kiel varperoj. Poste oni prenas blankan *ŝĵuan*-paperon kaj tranĉas ĝin en striojn egallarĝajn kiel tiuj de varperoj kaj vefteroj. Post tio oni per speciala teksilo teksas pentraĵon, interkrucente la paperajn fadenojn de vefto kaj varpo. Fine, laŭ la postulo de la pentraĵo oni kolorigas ĝin per diversaj koloroj. Jen estas farita la eksterordinara teksita pentraĵo el papero.

Nun en la Imperiestra Palaco de Pekino konserviĝas ekranoj el tiaj pentraĵoj, faritaj en la reg-periodo de la imperiestro Qianlong (1736-1796 sur la trono) de Qing-dinastio kun la imperiestra surskribo. Tiuj estas ĉinstilaj pentraĵoj delikatliniaj kaj liberstilaj.

Tiuspecaj pentraĵoj vendiĝis en Sudorienta Azio jam antaŭ pli ol 200 jaroj. Verkoj de veterana pentristo Huang Yongyuan faris sensacion en Londono en la 30-aj jaroj. Liaj verkoj "Cent floroj disflorantaj", "Luma perlo en montvilaĝo" k.a. estis eksponitaj en pli ol 40 landoj kaj regionoj. La pentraĵoj estis ankaŭ unu el la gravaj metiartaĵoj en ĉiuj Kantonaj Foiroj. La pentraĵoj kun vastaj temoj pri montoj, riveroj, floroj, birdoj, bestoj, historiaj figuroj, mitoj, teatraĵoj k.a. estas originala popola artaĵo de Ĉinio.

LAN QING kaj YUE HU:

Surdamuta baletistino kaj ŝia instruistino



Sceno el la baletto "Norda Vento" ludata de Xie Ling

KIEL kutime en la pasintaj 9 jaroj, Xie Ling sin vestis per rozeta vesto, nigra pantalono kaj defrotitaj balŝuoj kaj komencis ekzercadon antaŭ la mura spegulo. Tion ŝi faris ĉiutage jam en 9 jaroj, kaj ŝiaj instruistino kaj kunlernantoj preskaŭ forgesis, ke ŝi estas surdamutulo.

Xie Ling naskiĝis en malgran-

Xie Ling (meze) kaj ŝia instruistino Hu Xin kaj ties edzo

da urbo Wuhu en orienta Ĉinio kaj ŝiaj gepatroj estas laboristoj. Kiam ŝi estis 1-2-jara, ŝi ofte imite dancis, kaj en la aĝo de 3-4 jaroj ŝi jam povis improvizi danccon, kio ofte akiris aplaŭdon de aliaj. La najbaroj diris, ke ŝi fariĝos bona dancistino.

Sed kiam ŝi estis 4-jara, ŝi grave malsaniĝis kaj perdis la aŭdadon. Televidante la gajajn programerojn, ŝi plore demandis la

patriron: "Panjo, kial mi ne aŭdas?"

La gepatroj de Xie Ling foruzis sian lastan groŝon de ŝparmono por kuraci ŝin, sed neniom rikoltis. Iom post iom Xie Ling perdis ankaŭ parolkapablon. En la aĝo de 8 jaroj, Xie Ling eklernis en lernejo por surdamutuloj. Tie ŝi feliĉe renkontis instruistinon Hu Xin kaj ŝian fianĉon Zhu Husheng. De tiam Xie Ling komencis sian karieron de baletistino.

S-ino Hu Xin estis esperdona baletistino, sed ŝi devis ĉesi danci pro serioza malsano de la renoj. En sia hejmloko Wuhu ŝi komencis instruadon de baletto.

Ŝi venis al surdamutula lernejo kaj malgranda ĉarma knabineto vekis ŝian atenton. Ŝi plene fidis sian juĝon, ke tiu knabineto estos promesplena por dancarto. Tiu ĉi knabineto ja estis Xie Ling.

La enhavo de la unua leciono de s-ino Hu Xin estis interkomunikigo. Ŝi gvidis la infanojn en



iliaj distrado, plenumo de hejmtaskoj kaj bano. Ŝi dormis kune kun ili. Ŝi memlernis la gestan lingvon por libere "interparoli" kun la infanoj. Kiam la infanoj nomis ŝin "fratino" anstataŭ "instruistino", ŝi komencis instrui al ili dancon.

Estas multe pli malfacile instrui surdamutulojn ol instrui infanojn de normala kresko. La unua malfacilo por la gefianĉoj estis trovo de taŭga instrumento por surdamutuloj. S-ro Zhu Husheng tiam laboris kiel sonteknikisto kaj sceneja lumigisto. Li legis en materialo, ke antaŭe sovjetuniaj artistoj direktis surdamutajn aktorojn per scenejaj lumigiloj, kaj instigis la fianĉinon provi en tio. Sed ili ne akiris deziratan rezulton kaj devis serĉi novan solvon. Poste ili trovis, ke Xie Ling estis sentema pri ciferoj, kaj numeris la taktojn per ciferoj, direktis ŝin per la gesta lingvo en trejnado kaj sugestis ŝin per rigardoj kaj mienoj. Krome ŝi komprenigadis Xie Ling pri la interna signifo de la movoj de danco per figura ekspliko. En 1988 ŝi finis la trejnadon de la danco "Melodio el la koro" por Xie Ling. La sukcesa ludo de surdamutulino Xie Ling ravis la spektantojn, kaj ĉe la fino de ŝia ludo oni forgesis fermi la kurtenon, kaj la spektantoj kuris unuj post aliaj al la postscenejo por konstati, ĉu la dancistino vere estas surdamuta.

Xie Ling fariĝis la unua baletistino en la mondo, kiu dancas laŭ la direkto de instruisto per mangesto. Same kiel la aliaj baletistinoj, ŝi multe suferis de doloro pro unĝofalo, pusado kaj sangado de piedfingroj. Kiam ŝi ekstaris sur la piedpintoj, ŝi tuj sentis tranĉan doloron. Xie Ling ploris. Ploris ankaŭ ŝia patrino. Sed ŝiaj gepatroj ne retiriĝis. La patrino pli bone flegis la filinon kaj senĉese kuraĝigis ŝin. Xie Ling plej emociis ŝia instruistino. En la sekvanta tago post la edziniĝo Hu Xin tuj veturis kune kun

la infanoj al Ŝanhajo por prezenti. Malgraŭ malsano ŝi trejniis la infanojn 12 horojn ĉiutage. Krome ŝi devis serĉi taŭgajn ŝuojn kaj projekti vestojn por prezentado. Hu Xin multe penis en la pasintaj 9 jaroj por Xie Ling kaj ŝiaj kamaradetoj. Ŝi abortis pro troa laco, kio multe ĉagrenis la edzon, kaj tiu volis deadmoni ŝin de instruado. Sed Hu Xin daŭre klopodis por transigi sian artistan vivon al Xie Ling, kaj tio emociis la edzon. Fine la edzo memvole laboris por tiuj neordinaraj homoj kaj fariĝis sceneja intendanto. La edzino kontente laŭdis sian edzon, ke li estas "koloso".

Hu Xin opiniis, ke havigi al Xie Ling memrespekton kaj memfidon estas plej grave en la vivo de Xie Ling. Dum koregrafiado de la danco "Spirito de Bambuoj" ŝi intence aranĝis tiel, ke Xie Ling dancu kiel korifeo kune kun aliaj 11 sanaj dancistinoj. En 1989 la urbo Wuhu elektis 10 plej bonajn dancistojn. Hu Xin kuraĝigis Xie Ling konkuri kun sanaj dancistoj. Fine Xie Ling estis elektita kiel la unua stelulino. Nun ŝi estas ne nur bona aktorino, sed ankaŭ bona baleta instruistino.

En 1993 kiel membro de la Arta Ensemblo de Ĉinaj Kripluloj, ŝi vizitis 5 landojn de Sud-Orienta Azio. Ŝia ludo vekis sensacion en la vizitataj landoj. Ŝi ofte konigis al aliaj la prizorgon de geedzoj Deng Pufang, prezidanto de la Fonduso de la Ĉinaj Kripluloj. Ĉiufoje, kiam Xie Ling aperis sur la scenejo, Deng Pufang montris grandan ĝojon. Kien ili atingis, tie li prezentis ŝin al la ĉeestantoj, kiel sian propran filineton. Maje de 1994 Xie Ling vizitis Aŭstralion kaj Brition.

Xie Ling estis diplomita el la surdmutula lernejo. Parolante pri la estonteco, ŝi diris, ke ŝi volontas fari baletan instruadon por surdamutaj infanoj. Kaj s-ino Hu diris, ke ŝi restos ĉe Xie Ling por labori kiel ŝia helpanto. ■

GALERIO


Elefanta vinkruĉo

de RUAN HAIYING

Ĉinio havas abundon da delikataj antikvaj bronzaĵoj, ĉu heredataj ĉu arkeologie trovitaj. Ili estas trezoroj de la ĉina arto.

La bronza elefanta vinkruĉo en la foto estis elterigita en 1975, kaj ĝia farado datiĝis en Shang-dinastio (16-11-a jc. a.K.). La kruĉo altas 22.8 centimetrojn, longas 26.5 centimetrojn kaj pezas 25.7 kilogramojn. Ĝi havas formon de dika elefanto kun alte levita rostraro. Sur ĝia korpo estas tre belaj desegnoj. Sur la dorso de la elefanto estas aperituro, tra kiu oni povas enverŝi vinon, dum la rostraro servas kiel verŝilo, tra kiu elfluas vino.

Bronzaĵoj aperis en Ĉinio antaŭ 4 000 jaroj, kaj en Shang-dinastio la arto multe progresis. La elefanta vinkruĉo markis la altan nivelon de muldado de bronzaĵoj kaj montris la trajton de la bronzaĵoj de Shang-dinastio kaj la stilon de arto de la frua periodo de civilizacio de Ĉinio.



RODODENDRO

Rhododendro apartenas al la arbedoj kaj floras prin-
tempe.

En Ĉinio estas almenaŭ 600 specoj de rododendroj. Ili
kreskas en diversaj lokoj sude de Yangzi-rivero. Ili pros-
peras sur montodeklivoj aŭ estas kulturataj en kortoj. Ili
estas ofte vidata bela florplanto. La poŝtmarkoserio el
naŭ pecoj pri rododendro estis emisiita en 1991.



ISSN 0032-4361

